

EL *Popola*  
**ĈINIO**

N-ro 5

MAJO 1967





Prezidanto Maŭ Zedong

# Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo

MAŬ ZEDONG


(La 11-an de junio 1945)

NI havis tre sukcesan kongreson. Ni faris tri aferojn. Unue, ni decidis la linion de la Partio, nome kuraĝe mobilizi la amasojn kaj pligrandigi la popolajn fortojn, por ke ili sub la gvido de nia Partio venku la japanajn agresantojn, liberigu la tutlandan popolon kaj starigu novdemokratian Ĉinion. Due, ni akceptis la novan statuton de la Partio. Trie, ni elektis la gvidan organon de la Partio — la Centran Komitaton. De nun nia tasko estas gvidi la tutan membraron efektivigi la linion de la Partio. Ni okazigis kongreson de venko kaj de unuiĝo. Delegitoj donis bonegajn opiniojn pri la tri raportoj. Multaj kamaradoj faris memkritikon kaj, celante al unuiĝo, ĝin atingis per memkritiko. Tiu ĉi kongreso estas modelo de unuiĝo, de memkritiko kaj de enpartia demokratio.

Post la fermo de la kongreso, multaj kamaradoj reiros al siaj laborpostenoj kaj dise al diversaj batalkampoj. Kamaradoj, kiam vi alvenos al diversaj lokoj, vi propagandu la linion de la kongreso kaj, pere de la membroj de la Partio, klarigu ĝin al la vastaj popolamasoj.

La celo de nia propagando pri la linio de la kongreso estas tio, ke la tuta Partio kaj la tuta popolo starigu fidon pri la nepra triumfo de la revolucio. Unue, ni devas plialtigi la politikan konscion de la avangardo, por ke ili faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas.

Ni devas veki ankaŭ la politikan konscion de la vastaj popolamasoj de la tuta lando, por ke ili volonte kaj ĝoje batalu kune kun ni por akiri venkon. Ni havigu al la tuta popolo la jenan fidon: Ĉinio apartenas al la ĉina popolo, sed ne al la reakciuloj. Ekzistas antikva ĉina fablo, nome “Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo”. Ĝi rakontas pri maljunulo, kiu loĝis en norda Ĉinio antaŭ tre tre longa tempo kaj estis konata kiel Malsaĝa Avo de la Norda Monto. Sude antaŭ lia domo staris la du grandaj montoj Tajhang kaj Vangvu, kiuj baris al li la vojon. Li decidis kaj gvidis siajn filojn forigi tiujn ĉi montojn per ŝpatoj. Alia grandaĝulo konata kiel Saĝa Maljunulo vidis ilin kaj ridis, dirante: “Kiom malsaĝaj vi estas! Estas tute neeble por vi kelkaj homoj fose forigi tiujn ĉi du grandajn montojn.” La Malsaĝa Avo respondis: “Kiam mi mortos, miaj filoj daŭrigos la laboron; kiam ili mortos, estos miaj nepoj, kaj poste iliaj filoj kaj nepoj, kaj tiel plu senfine. Kvan-kam la du montoj estas tre altaj, tamen ili ne povos kreski kaj, kun defosado de ĉiu peco, ili malaltiĝos iom post iom. Kial do ni ne povos ilin ebenigi?” Refutinte la eraran opinion de la Saĝa Maljunulo, li daŭrigis la fosadon ĉiun tagon sen iometa ŝanceliĝo. Tio kortuŝis Dion kaj li sendis teren du anĝelojn, kiuj surdorse forportis la montojn. Nuntempe, troviĝas ankaŭ du grandaj montoj peze kuŝantaj sur la dorso de la ĉina popolo. Unu estas imperiismo kaj la alia feŭdismo. La Komunista Partio de Ĉinio decidis jam antaŭ longe forigi ilin.



*Kiam oni kreive studas kaj kreive aplikas la "tri malnovajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ, ŝanĝiĝas la homoj kaj la fizionomio de la lando. La membroj de Bajzang-brigado de Ŝangŝe-komunumo en la gubernio Juhian, Ŝanhi-provinco, estas konstruantaj ŝtupar-kampojn.*

Ni devas nepre persisti kaj labori senĉese, kaj ankaŭ ni kortuŝos Dion. Nia Dio estas neniu alia ol la popolamasoj de la tuta Ĉinio. Se ili leviĝos kaj fosos kune kun ni, kial ni ne povos alniveligi la du montojn al la tero?

Hieraŭ, du usonanoj estis reirontaj al sia lando kaj mi diris al ili, ke la usona registaro volas subfosi nin kaj tio ne estas permesita. Ni oponas la politikon de la usona registaro subteni Ĉiang Kajŝek kontraŭ la komunistoj. Tamen ni diferencigas, unue, la usonan popolon de ĝia registaro kaj, due, interne de la usona registaro la politik-decidantojn disde la subaj ordinaraj funkciuloj. Mi diris al la du usonanoj: "Diru al la politik-decidantoj en via registaro, ke ni malpermesas al vi usonanoj eniri en la Liberigitajn Regionojn, ĉar via politiko estas subteni Ĉiang Kajŝek kontraŭ la komunistoj kaj ni devas esti singardemaj. Vi povas veni al la Liberigitaj Regionoj, se via celo estas batali kontraŭ Japanio, sed ni unue faru kontrakton. Ni ne permesas al vi ŝtele iri ĉien. Ĉar Patrick J. Hurley jam publike deklaris sin kontraŭ kunlaboro kun la Komunista Partio de Ĉinio, kial vi ankoraŭ volas veni kaj vagi ĉien en niaj Liberigitaj Regionoj?"

La politiko de la usona registaro subteni Ĉiang Kajŝek kontraŭ la komunistoj mon-

tras la furiozecon de la usonaj reakciuloj. Sed ĉiuj intrigoj de la reakciuloj, ĉu ĉinaj ĉu fremdaj, por malebligi al la ĉina popolo gajni venkon estas destinitaj al malsukceso. La demokratio estas la ĉefa fluo en la mondo hodiaŭ, dum la kontraŭdemokratia reakcio estas nur kontraŭfluo. Nuntempe, la reakcia kontraŭfluo penas superregi la ĉefan fluon de nacia sendependiĝo kaj popola demokratio, sed ĝi neniam povos fariĝi la ĉefa fluo. Hodiaŭ ankoraŭ sin trovas en la malnova mondo tri grandaj kontraŭdiroj, kiel montris Stalin antaŭ longe: unue, la kontraŭdiro inter la proletaro kaj burĝaro en la imperiismaj landoj; due, la kontraŭdiro inter diversaj imperiismaj potencoj; kaj trie, la kontraŭdiro inter la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj kaj la imperiismaj metropolaj landoj. Ne sole ankoraŭ ekzistas tiuj ĉi tri kontraŭdiroj, sed ili fariĝas eĉ pli akraj kaj pli disvastigitaj. Pro la ekzisto kaj kresko de tiuj kontraŭdiroj, kvankam sin trovas nun reakcia kontraŭfluo kontraŭ Sovetio, komunismo kaj demokratio, tamen ĝi fine estos venkita iam estonte.

Ĉimomente estas okazigataj du kongresoj en Ĉinio, nome la Sesa Tutlanda Kongreso de Kuomintango kaj la Sepa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio. Ili havas tute malsamajn celojn: la celo de unu estas ekstermi la Komunistan Partion kaj

ĉiujn aliajn demokratajn fortojn en Ĉinio kaj tiel treni Ĉinion en mallumon; la celo de la alia estas faligi la japanan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn, la ĉinajn feŭdajn fortojn, kaj konstrui novdemokratian Ĉinion, kaj tiel konduki Ĉinion al lumo. Tiuj ĉi du

linioj batalas unu kontraŭ la alia. Ni firme kredas, ke gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio kaj direktata de la linio de ĝia Sepa Kongreso, la ĉina popolo akiros plenan venkon, dum la kontraŭrevolucia linio de Kuomintango neeviteble malvenkos.

## La Historia Fono de “Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo”

Ĉi tiu brila verko *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* estas la ferma parolado farita de Prezidanto Maŭ la 11-an de junio 1945 en la Sepa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Tiutempe, la internacia kontraŭfaŝisma milito jam akiris decidan venkon, kaj la japana imperiismo estis baldaŭ venkota. Sed sur la antaŭenmarŝa vojo de la Partio kaj la popolo ekzistis ankoraŭ serioza batalo. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris, ke nun pezas ankoraŭ sur la dorso de la ĉina popolo du grandaj montoj — la imperiismo kaj feŭdismo. La japana imperiismo ankoraŭ ne estas fine venkita. Kaj la usona imperiismo aktive kondukas la politikon subteni Ĉiang Kajŝek kaj kontraŭi komunismon, vane intencante transformi Ĉinion en sian propran kolonion post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo. Sub la forta apogo de la usona imperiismo, kuomintangaj reakciuloj intensigas preparon de la enlanda milito por ekstermi la popolan revolucian forton, forrabi la fruktojn de la venko gajnita de la popolo en la Rezistmilito kaj konduki Ĉinion en mallumon.

Sekve, post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, en Ĉinio ekzistis kiel antaŭe, du vojoj kaj estontejoj: unu el ili estas, ke la imperiismo, precipe la usona imperiismo daŭrigas sian okupadon de Ĉinio kaj denove ĝin revenigos al la malnova vojo duonkolonia-duonfeŭdisma; kaj la alia estas senrezerve mobilizi la amasojn kaj plipotenci la popolajn fortojn por komplete renversi regadon de imperiismo kaj feŭdismo en Ĉinio kaj konstrui novan popolan demokratian Ĉinion, sub la gvidado de la komunista Partio de Ĉinio.

Ĉe tiu grava momento de historia turniĝo, nia Partio okazigis la Sepan Tutlandan Kongreson. La Kongreso persone prezidata de Prezidanto Maŭ difinis la partian linion, akceptis la novan statuton de la Partio kaj elektis la Centran Komitaton kun Prezidanto Maŭ ĉe la kapo. La Kongreso certigis, ke la penso de Maŭ Zedong estu la direktilo en ĉiuj laboroj de la tuta Partio. *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* estas la brila

verko, kiun Prezidanto Maŭ faris kiel la ferman paroladon al la Kongreso por mobilizi la tutan membraron de la Partio kaj la tutan popolon plenumi la politikan linion ellaboritan en la Sepa Kongreso de la Partio kaj venki ĝisfunde en- kaj ekster-landajn reakciulojn, kaj por batalakiri venkon de la nacia kaj demokratia revolucio.

Same kiel la verkoj *Servu al la Popolo* kaj *Rememore al Norman Bethune*, ĉi tiu brila verko *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* estas granda klasika dokumento de komunisma edukado kaj la plej baza deviga leciono, per kiu la revolucia popolo starigas sian komunisman mondkoncepton. Dum pli ol dudek jaroj la granda penso de tiu ĉi brila verko edukas kaj kuraĝigas la vastajn revoluciajn kadrojn kaj amasojn de Ĉinio. Por la venko de la popola revolucia afero kaj efektivigo de la linio de la Partio, ili kuraĝas surgrimpi la monton de glavoj, eniri la maron de fajro kaj timas nek malfacilojn, nek malamikojn. Sub ĝia inspirado ili ĉiam heroe antaŭenmarŝas sur la vasta vojo de revolucio. La sonora alvoko farita de Prezidanto Maŭ en tiu ĉi verko “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**” jam fariĝis konata de ĉiuj familioj, normo de pensado kaj agado de la revolucia popolo en nia lando kaj stilo de nia epoko.

En la nuna granda proleta kultura revolucio, la revolucia proleta linio reprezentata de Prezidanto Maŭ jam gajnis grandan venkon, dum la reakcia linio de la burĝaro tute fiaskis. Lernante serioze ĉi tiun brilan verkon de Prezidanto Maŭ kaj koncernajn instrukciojn pri la depreno de regpotenco kaj sin armantaj per la penso de Maŭ Zedong, la ĉinaj ruĝaj ribeluloj firme tenas sin ĉe sia starpunkto, prenas klaran direkton, metas “kuraĝon” en la unuan lokon, konkeras ĉiujn malfacilojn kaj venkas ĉiujn obstaklojn, por praktiki la principon de granda unuiĝo kun ĉiuj proletaj revoluciaj ribeluloj en deprenado de la regpotenco for de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon kaj antaŭenpuŝas la grandan proletan kulturen revolucion al la tute nova etapo.

# Prezidanto Maŭ Intervjuo

## V. G. Wilcox

**K**AMARADO Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda gvidanto de la ĉina popolo, intervidiĝis, posttagmeze je la 12-a de marto, kun kamarado V. G. Wilcox, Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio de Novzelando.

Kamarado Maŭ Zedong kaj kamarado V. G. Wilcox havis ekstreme intiman interparolon.

La intervidiĝon ĉeestis kamarado Ĝou Enlaj kaj kamarado Kang Ŝeng, membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj kamarado Liu Ningji, membro de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Partio.

Ĝin ĉeestis ankaŭ kamaradino Rita Smith, membro de la Landa Komitato de la Komunista Partio de Novzelando, kiu estas en Pekino.

*K-do Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj granda gvidanto de la ĉina popolo, intervidiĝis kun k-do V. G. Wilcox, Ĝenerala Sekretario de la Komunista Partio de Novzelando, (tria de maldekstre) en la 12-a de marto. La dua de dekstre estas membro de la Landa Komitato de la Komunista Partio de Novzelando, k-dino Rita Smith, restanta en Pekino.*



# idiĝis kun Kamarado



# La Tutmonda Popolo Prikantas Prezidanton Maŭ

*Afriko Batalanta Prikantas Maŭ Zedong kaj  
Lian Aferon*

**KANTISTO** el la gvinea ŝtata ensemblo "Djoliba"

*Ho, Maŭ Zedong, mi prikantas Vin  
mi prikantas Vin . . .  
Viaj verkoj estas forto ja sen fin'.  
Via penso estas la ĉiam brilanta sun'.  
Mi prezentos mian kanton al la nigraj fratoj,  
Se mi venos al Afriko;  
Kaj mi kantos al la blankaj fratoj,  
Se mi venos al Eŭrop' aŭ Ameriko.  
Ho, ĉie kien mi alvenos, mi almigros,  
Mi ĉi veron diskonigos.  
Kaj ĉi tiu vero estas batalkorno por libero  
Kaj samtempe brila penso lumiganta inter la ĉiel' kaj tero!  
Via brilo estas por mi ne finprikantebla,  
Sed mi Vin prikantos por eterne!  
Vin prikantos por eterne!*

*Por Ĉiam Estas Prezidanto Maŭ Nesubiranta Sun'*

**ARTHUR** (Britio)

*Ĉe la vilaĝo Ŝaiŝan belas arboj, floroj,  
Kaj helas la montaro fora en l' aŭroro.  
Ho, sub la granda penso de Maŭ Zedong,  
Plenplene ruĝas mia tuta koro.  
La sun' lumigas ja Pekinon de pratemp' ĝis nun,  
Sed ĝi ne povas sin kompari kun la pens' de Maŭ Zedong.  
La lasta ja lumigas la popolon tra la tuta mond',  
Por ĉiam estas Prezidanto Maŭ nesubiranta sun'.*



## *Prezidanto Maŭ Ridetas*


ALEKS CACI (Albanio)

*Kiam Prezidanto Maŭ ridetas,  
Mi divenas:  
Kiom ardan koron por popolo li posedas.  
Sur la tero pompas flora maro,  
Riĉrikolto regas ĉie en kamparo.*

*Kiam Prezidanto Maŭ ridetas,  
Mi divenas:  
Altajn montojn venkos ĉinpopolo,  
Morte timas malamikoj la aperon de aŭroro  
Kaj maldormas tutan nokton en angoro.*

*Kiam Prezidanto Maŭ ridetas,  
Scias ankaŭ l' malamikoj:  
Venko de l' popolo ripetiĝi pretas,  
Tuj aperos komunisma lucifero,  
Kaj foriĝos nigraj nuboj de sur la ĉielo.*

*Kiam Prezidanto Maŭ ridetas,  
Ĉiuj ja divenas:  
La Morgaŭ prezentos pli da belo.*



*Ebrahim, vicdelegito de Azania Pan-Afrikanista Kongreso laŭlegas el Vortoj de Prezidanto Maŭ en la fondiĝa kunveno de "La Amikoj de Ĉinio" en Anglio.*

## *Maŭ Zedong, la Sun' en l' Oriento*

ANOWAR HAKIM (Palestino)

*Rigardu! Jen Pekino brile dissendanta  
Radiojn orajn ĝis la firmamento.  
Per la hellumo de l' giganto,  
Ruĝiĝas tuta l' oriento.*

*Ho, Maŭ Zedong! la suno en la oriento!  
Vi donas ja esperon al la tuta mondo,  
Vi montras al ni de marŝado la direkton.  
Ni sekvas vin en la revolucia ondo,  
Forbalaante ĉiujn finsektejn!*

*Rigardu!  
La venk-aŭroro  
Forŝovas noktan la kurtenon.  
Jam venos tuj la venka horo,  
Kaj morgaŭ l' mondo ĝuos lumon kaj serenon.*

# *Kanto pri Granda Maŭ Zedong*

**CRISTÓBAL** (Kubo)

*Estimata kamarado Maŭ Zedong,  
Kara kamarado Maŭ Zedong,  
Mi konigos vian nomon  
Tra la tuta mond'.*

*Kantas mi pri via giganteco,  
Pri amego via al popolo,  
La senlima animfort' kaj saĝa decidemo,  
Kaj pri l' eminenta kontribu' al la homaro.*

*Ja senfine prilaiŭdindas  
Ankaŭ via granda penso.*

*Vi tagnokte diligentas  
Por projekti belan estontecon homan en la menso.*

*Ho, estimata kamarado Maŭ Zedong,  
Ho, kara kamarado Maŭ Zedong,  
Akceptu mian amon plej elkoran  
Al vi kaj la estimon plej sinceran.*

*Palestinaj gejunuloj, kiuj ĵus revenis al Gaza post vizito al Ĉinio, kantas Ruĝas la Oriento en la ĉina lingvo, tenante en la mano la libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ.*



# Novajoj pri Eldonoj de Verkoj de Prezidanto Maŭ en la Mondo

## EN JAPANIO

Responde al la urĝa bezono de la japanaj legantoj por ĉiutage lerni la penson de Maŭ Zedong kaj legi citaĵojn el verkoj de Prezidanto Maŭ, la Orienta Librejo eldonis *Vortojn de Maŭ Zedong en Foliaro*, kiu entenas 31 eldirojn de Prezidanto Maŭ kaj povas esti pendigita sur muro por foliumante legi ĉiutage dum monato.

## EN GREKIO

En la lasta tempo aperis en Ateno la greklingva *Vortoj de Prezidanto Maŭ* kiu estas eldonita de la Atena Historia Eldonejo.


En lastaj jaroj, multaj verkoj de Prezidanto Maŭ aperis en Grekio en greka traduko kaj ricevis varman akcepton de la greka popolo. Sole en 1966, eldoniĝis dek ses verkoj de Prezidanto Maŭ, inkluzive: *Parolado ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, *Pri Longdaŭra Milito*, *Problemoj de Strategio en la Ĉina Revolucia Milito*, *Lerno kaj Situacio*, *Kontraŭ Liberalismo* kaj aliajn.

## EN CEJLONO

La 2-an de marto, *Vortoj de Prezidanto Maŭ* en singala lingvo — la trezora libro delonge sopirita de la cejlona popolo jam estis eldonita de la Cejlona Komunista Partio en Kolombo. La brilaj artikoloj de Prezidanto Maŭ Zedong *Servu al la popolo*, *Rememore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* estas eldonitaj de Kolomba Popola Eldonejo en tamila kaj singala lingvoj.

## EN HINDIO

Lastatempe, en la urbo Kalikut, Kerala, Hindio, la Marksista Eldonejo eldonis la du brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ: *Esti Oponata de la Malamikoj Estas Afero Bona sed Ne Malbona* kaj *De Kie De-*



*Kun alta politika fervoro, gelaboristoj de iu presejo en Tokio, Japanio, rapide surmetas kovrilon al la libreto Vortoj de Prezidanto Maŭ.*

*venas la Ĝusta Penso de Homoj?* en malajalama lingvo (unu el la ĉefaj lingvoj de suda Hindio).

## EN SVEDIO

En la komenco de februaro, ĉijare, aperis en Stokholmo la svedlingva *Elektitaj Politikaj Verkoj de Maŭ Zedong*, kiu enhavas 12 gravajn verkojn, inkluzive: *Pri Praktiko*, *Pri Kontraŭdiroj*, *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*, *La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio*, *La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj*, *Pri Popol-demokratia diktaturo*, *Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong* kaj *Problemoj de Strategio en Kontraŭjapana Gerila Milito*.

## EN ITALIO

La itala *Orientilo* plentekste aperigis en sia aŭgusta numero de 1966 la verkon de Prezidanto Maŭ Zedong *Sola Fajrero Povas Forbruligi Tutan Stepon* kaj emfaze montris en la redakcia noto, ke ankaŭ por Italio taŭgas la instruo de Prezidanto Maŭ koncerne al klasbatalo, kaj ke la baza problemo estas sensanceliĝe fidi la revolucion kaj firme batali por antaŭenpuŝi ĝin en ĉia ajn cirkonstancaro.

## EN ORIENTA PAKISTANO

La tri verkoj de Prezidanto Maŭ *Analizo de la Klasoj en Ĉina Socio*, *Pri Praktiko*, *Pri Nov-Demokratio* jam aperis tradukitaj en bengala lingvo en la ĉefurbo Daka de Orienta Pakistano kaj ricevis varman akcepton ĉe vasta legantaro.

# Batalo por Depreni Poten

*Ekde la granda proleta kultura revolucio en nia lando, la redakcio de EPC ĉiutage ricevas leterojn plenajn de entuziasmo el diversaj lokoj de la mondo. En siaj leteroj, multaj fremdlandaj amikoj kun admiro montras, ke la senprecedenca granda proleta kultura revolucio estas la plej granda evento en la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento, ege granda iniciativo en la internacia komunisma movado kaj granda afero en la historio de la homaro, kia neniam estis. Ili varme ĝojkrias kaj sincere gratulas nin pro la akirita venko de la granda revolucio. Tamen, en siaj leteroj iuj amikoj elmetis demandojn pri aferoj ne bone kompreneblaj. Ni bonvenigas la demandojn elmetitajn de la amikoj kun bondeziro.*

*Lastatempe, iuj amikoj en siaj leteroj elmetis demandojn pri la batalo por depreni potencon en la granda proleta kultura revolucio. Ekzemple: Kial en la socialisma Ĉinio necesas depreno de potenco? Kiu deprenas potencon? De kiu kaj kiel oni deprenas potencon? Al ĉi-tiuj demandoj ni jam donis konkretajn respondojn per raportoj kaj artikoloj en lastaj numeroj de nia gazeto. Ankaŭ "Batalo por Depreni Potencon de la Provinco Ŝanhi" k. a. artikoloj en tiu ĉi numero donas respondojn al tiuj demandoj.*

*Sub la gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, la ĉina popolo deprenis la regpotencon en la tuta lando kaj starigis la ŝtaton de proleta diktaturo en 1949, post 28-jara malfacila batalado. Sed, la renversitaj klasaj malamikoj ankoraŭ ekzistas kaj estas nekontentaj pri sia malvenko. Ankaŭ en la vicoj de la proletaro kaj etproduktantoj naskiĝos novaj burĝaj elementoj. La plenmano da potenctenantoj enŝteliĝintaj en la Partion, kiuj iras la kapitalisman vojon, estas reprezentantoj de la burĝaro. Ili estas nekontentaj pri la pereado de la ekspluata sistemo, uzurpis la gvidantecon en iuj lokoj kaj iuj fakoj, efektivas burĝan diktaturon kaj ĉiurimede intencas retrotreni la socialisman*



En la tertremiga krio de revolucia ribelo, la Ŝanhi-aj revoluciaj ribeluloj efektivigis grandan unuiĝon surbaze de la penso de Maŭ Zedong, formis potencon revolucion forton kaj deprenis la potencon for de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon!

La granda venko de la potencdeprena batalo de Ŝanhi-aj revoluciaj ribeluloj skribis brilan paĝon en la historio de la granda proleta kultura revolucio kaj faris novan kontribuon al la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio.


## EFEKTIVIGI GRANDAN UNUIĜON DE PROLETAJ REVOLUCIULOJ

Prezidanto Maŭ diris: **"Organizado de centoj da milionoj da popolanoj kaj movo de vasta revolucia armeo estas bezonataj por la hodiaŭa atako de la revolucio al la kontraŭrevolucio."**

Dumlonge, en la Kompartia Komitato de la

provinco Ŝanhi, la kontraŭrevolucia reviziisma kliko, farinte Ŝanhi "sendependa regno" de burĝa diktaturo, atakis kaj persekutis revolucionajn kadrojn kaj amasojn. En la granda proleta kultura revolucio, ĝi obstine efektivigis la burĝan reakcian linion, faris al la revoluciaj ribeluloj diversajn kruelajn persekutojn, subpremis la amasan movadon, eĉ eljetis ekonomisman, kiu detruas la ŝtatan vivarterion kaj socialisman ekonomian konstruadon. Ili faris damnindan krimon. Ĉio ĉi tio igis la Ŝanhi-ajn vastajn amasojn de revoluciaj ribeluloj

*ŝura kunveno por transpreno de potenco fare de revoluciuloj de Ŝanhi-provinco.*



# con de la Provinco Ŝanhi

*Ĉinion al kapitalismo. Tial, la batalo inter la burĝaro kaj proletaro por depreni potencon, ĉiam ondante iras. Ekde la komenco la granda proleta kultura revolucio ja estas batalo por depreni potencon. La kultura revolucio signifas mobilizi la amasojn de centoj da milionoj da popolanoj por ke ili mem sin liberigu kaj deprenu la potencon for de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Nur per konduko de tia granda amasa movado kia tiu ĉi, povas plene solviĝi la problemo pri la proleta depreno de potenco kaj tiu pri la proleta diktaturo.*

*Organizinte sin en vastan armeon de la revoluciaj ribeluloj, la revoluciaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj intelektuloj kaj revoluciaj kadroj (inkluzive de gvidantaj kadroj) reprenas ĉiujn potencojn de la partio, politiko, financo kaj kulturo for de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Tio estas sendube prava, nepre fareda!*

*En sia resumo de la sperto de la Pariza Komunumo, Marks montris, ke la proletaro absolute ne devas transpreni la ŝtatan maŝinon de la burĝaro, sed tute disrompi ĝin. Se iuj institucioj kaj entreprenoj estas okupitaj de plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, jam fariĝis instrumentoj de la burĝa diktaturo, do la revoluciaj ribeluloj certe ne povas transpreni ilin sensanĝe, sed devas krei tute novan organizan formon de regpovo konforman al la socialisma ekonomia fundamento, tra praktiko de la batalo por depreno de potenco kaj plene disvolvante saĝon de la revoluciaj amasoj.*

*La grandaj sukcesoj de la granda proleta kultura revolucio montras la ankoraŭ pli brillegan perspektivon de la granda socialisma Ĉinio.*

*La Red.*




loj pli kaj pli klare vidi la demonan fizionomion de la plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj. Komuna batalo, komuna sorto kaj komuna sento rapide unuigis kaj solidariĝis la revoluciajn ribelulojn sub la granda standardo de la penso de Maŭ Zedong. La unuiĝo inkluzivas ne nur revoluciajn laboristojn, kamparanojn, lernantojn, intelektulojn kaj ordinarajn revoluciajn kadrojn, sed ankaŭ revoluciajn armeanojn kaj kadrojn gvidantajn. Tiu vasta unuiĝo ekstreme izolis la malamikojn por ke la plenmano da kontraŭrevoluciaj re-

viziistoj en la provinca kompartia komitato estu enfermitaj de la multtavola sieĝo de la revoluciaj amasoj.

Sub la standardo de granda revolucia unuiĝo, revoluciaj ribelaj organizoj elpaŝis unu post alia.

Nombro da revoluciaj gvidantaj kadroj en la Kompartia Komitato de la provinco Ŝanhi elpaŝis. Kvin gvidantaj kadroj kun kamarado Liu Geping ĉe la kapo publikigis opiniafiŝon forte atakantan la plenmanon da kontraŭrevoluciaj reviziistoj en la provinca



Kompartia Komitato en 10-a, jan., firme starante ĉe la proleta revolucia linio reprezentata de Prezidanto Maŭ en la vivmorta batalo inter la du linioj. Ilia agado ricevis varman subtenon de la vasta revolucia ribelularo. De longe, parto de tiuj revoluciaj gvidantaj kadroj kondukis nepacigeblan batalon kontraŭ la plenmano da centraj kaj lokaj potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. En la granda kultura revolucio ili traspertis ekzamenon de la amasa movado. En la kriza momento de la batalo por depreni potencon, ili firmdecide elpaŝis, batalis kaj venkis kune kun la revoluciaj ribeluloj. En la longdaŭra batalado, la vastaj amasoj de revoluciaj ribelulaj batalantoj ankaŭ distingis tiujn ĉi kadrojn per klasa analizo kaj klare vidis, ke ili staras ĉe la proleta revolucia linio. Sekve, la vasta revolucia ribelularo kune kun tiuj gvidantaj kadroj, unuiĝinte, malfermis novan situacion por la granda kultura revolucio.

La Ĉina Popola Liberiga Armeo senlime fidela al Prezidanto Maŭ donis fortan helpon al la vastaj revoluciaj amasoj. La komandantoj kaj batalantoj de la Ŝanhi-a Armea Regiono memkonscie kaj fidele praktikis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kaj firme starante ĉe la revoluciaj ribeluloj, rekte partoprenis en la batalo por depreni potencon je 12-a, jan. Tio multe kaj forte kuraĝigis la proletajn revoluciulojn, kaj multe kaj forte subpremis la arogantecon de la kontraŭrevoluciaj reviziistoj kaj lojalistoj de la burĝaro.

Prezidanto Maŭ diris: **“Kiu estas niaj malamikoj? Kiu estas niaj amikoj? Tio estas demando kun primara graveco por la revolucio.”** Iuj opinias ke la potenctenantoj ĉiuj devas esti faligitaj. La penso ĉion neigi kaj ĉion ekskluzivi radikale estas kontraŭa al la vidpunkto de klasa analizo de la penso de Maŭ Zedong. Plenmano da maliculoj intencis konfuzi aferojn kaj semi per klaĉoj malakordojn inter la revoluciaj ribeluloj kaj revoluciaj gvidantaj kadroj por detruigi grandan unuiĝon de la revoluciaj maldekstruloj. Sed ilia intrigo neniam povas sukcesi.

#### ESTABLI REVOLUCIAJN REGPOTENCAJN ORGANIZOJN DE LA PROLETARO

Naskiĝis la “Ĉefkomandejo de la Ŝanhi-aj Revoluciaj Ribeluloj” en la kriza momento por la revoluciaj ribeluloj efektiviĝi grandan unui-

ĝon por depreni potencon. Ĝi prenis ĉiujn regpotencojn de la Kompartia Komitato kaj Popola Komitato de la provinco Ŝanhi kaj tenas la regpotencojn de la Partio kaj administrato de la tuta provinco.

La membroj de la “Ĉefkomandejo de Ŝanhi-aj Revoluciaj Ribeluloj” estas elektitaj de la kongreso de organizoj de revoluciaj amasoj, garnizono de la provinco Ŝanhi kaj revoluciaj gvidantaj kadroj. Ĉiuj gravaj principaj problemoj devas esti donitaj al la kongreso por diskuti kaj decidi. La ĉiutagaj aferoj estas kondukataj de la Ĉefkomandejo. En la Ĉefkomandejo estas laboristoj, kamparanoj, revoluciaj lernantoj, revoluciaj intelektuloj, kaj ankaŭ revoluciaj armeanoj kaj kadroj gvidantaj. Ili ĉiuj estas revoluciaj sturmantoj aperintaj en la streĉa klasbatalo de la granda kultura revolucio. Ili havas intiman rilaton kun la amasoj kaj estas fidataj de ili. Prezidanto Maŭ diris: **“Vi devas teni politikon en komando, iri en la amasojn, kaj pli bone konduki la grandan proletan kulturen revolucion kune kun la amasoj.”** Tiuj revoluciaj gvidantaj kadroj laborantaj en la Ĉefkomandejo agas laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, forigis sian sinjorecan sintenon, kaj sidis kun la ordinaraj popoloj por kune diskuti demandojn. “Ni estas kaj anoj el la amaso kaj gvidantoj,” diris membro de la Ĉefkomandejo, “ĉiuj ni estas servantoj de la popolo.” La revoluciaj amasoj devas teni la laborantojn de la Ĉefkomandejo sub sia supervido kaj fari necesajn kritikojn al ili, kaj ŝanĝi iam ajn tiujn, kiuj ne taŭgas por sia ofico. La vastaj revoluciaj amasoj firme subtenas la gvidadon de la “Ĉefkomandejo de Revoluciaj Ribeluloj.” Sub la gvido de la Ĉefkomandejo, en multaj lokoj establiĝis loka “komitato por depreno de potenco”. Tiaj organizoj unuigite konsistas el reprezentantoj de lokaj revoluciaj ribeluloj, kaj estas partoprenata de reprezentanto de la Ĉefkomandejo. Tio helpas al pliapaŝa firmigo kaj grandigo de granda unuiĝo de revoluciaj maldekstruloj kaj garantias rapidan disvolviĝon de la batalo por depreni potencon en la tuta provinco. La Ĉefkomandejo firme efektivas la instrukcion de Prezidanto Maŭ **“firme teni la revolucion kaj stimuli la produkton”**, establis “produktan komitaton” por gvidi la industrian kaj agrikulturen produktadon kaj konstruadon de la tuta provinco.

# Ŝtormo Ne Povas Faligi Fortan Pinon

“Por Kio Estas Tio?”

**L**A nigra vento de ekonoimismo blovis en la Ŝanhajan Reakciilan Ĉefabrikon en la fino de 1966. Sub la formo de pagoj de aldona salajro, bonstatiga elspezo kaj subvencio por interkontakta veturado ktp., granda monsumo elfluis el la manoj de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

Por kio estas tio? Kolektigis veteranaj laboristoj en la fabriko kaj diskutis pri tio. Kaj serio da demandoj elmetiĝis.

“La mono apartenas al la ŝtato, al la popolo, sed nun tiel disdoniĝis en grandaj sumoj. Kaj tiom multe da cirkula mono impetas kontraŭ la merkato, tio povas alporti al la nacia ekonomio seriozan damaĝon!”



*Revoluciaj terkulturistoj de Ĉuanŝa-gubernio, Ŝanhajo, firme batalas kontraŭ la kontraŭrevolucia ekonoimismo.*

“Ĉu ni faras la grandan kulturalan revolucion kaj abolas ĉiajn malraciajn sistemojn nur por kelkaj moneroj?”

Iu veterana laboristo stariĝis kaj diris kun eksciteco: “Ne, tio ja estas intrigo de la malamiko. Ili celas per mono subaĉeti la revolucion laboristaron, subfosi la grandan kulturalan revolucion kaj protekti sian reakcian regadon. Ni devas ne trompiĝi kaj nepre malkaŝi la novan intrigon de la malamiko, ni devas repuŝi la atakon de sukertegitaj obuso!”

### Mono Ne Povas Nin Subaĉeti

Veteranaj laboristoj trovis en la fabriko la potenctenantojn, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj severe ilin avertis: “Malpermeson al vi elspezi kontraŭracie kaj malprudente sen konsento de la revoluciaj ribeluloj!”

La malamiko ja ne povas fariĝi obeemaj. Promesinte ne elspezi senbezone, ili tamen subskribe konsentis sinsekvajn elspezojn tuj poste.

La trompaj artifiko luditaj de la potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon indignigis la revoluciajn ribelulojn, kaj ĉi tiuj kondukis firman batalon kontraŭ la malamiko. Kiam veterana laboristo Hu Ahing rimarkis, ke la sumo de lia salajro en la salajrlisto pligrandiĝis, tuj li malkaŝis la insidon de la potenctenantoj, kaj ordonis ke ili ĝin korektu.

Kiam la emerita laboristo Ĝang Keĵong ricevis de sia filino la aldonan salajron por ŝia edzo, kolere li ĵetis teren la monon dirante: “Tio ĉi estas ne mono, sed sukertegita obuso!”

Kvankam la maljuna laboristo jam estas en emeriteco, lia revolucia penso tamen ne emeritiĝis. Li diris: “Kvankam mi maljuniĝis, malmola tamen restas mia ostaro kaj ruĝa mia koro. La mizeraj tagoj en la malnova socio devas neniam reveni. Ni nepre sekvos Prezidanton Maŭ kaj kondukos ĝisfine la grandan proletan kulturalan revolucion!”

Alia laboristo Jan Ŝihin redonis la aldonan salajron kaj kun indigno diris: “Ni, la laboristaro, faras revolucion sub la gvido de Prezidanto Maŭ, kaj plej aŭskultas liajn vortojn. La monon mi firme rifuzas!”

“Ne por mono ni revolucias, kaj mono ne povas subaĉeti la revolucion volon de ni, la laboristaro.”...

Ŝtormo ne povas faligi fortan pinon. La malmolostaj laboristoj, kiaj Ĝang Keĵong, Jan Ŝihin k. a. en la reakciila ĉeffabriko staras senŝanceliĝe kontraŭ la nigra vento de ekonomiiismo.

### Repuŝi la Nigran Venton per la Penso de Maŭ Zedong

Granda sumo da mono disdoniĝis el la manoj de la potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon. Kelkaj laboristoj trompigitaj jam prenis la monon. Kion fari? La revoluciaj ribeluloj el la laboristoj konkludis post analizo, ke la nigra vento de ekonomiiismo povis disvastiĝi en la fabriko nur pro tio, ke parto de la laboristoj havas ankoraŭ egoisman kalkulon. Oni devas nepre turni la venenan herbaĉon en bonan sterkon, uzi la penson de Maŭ Zedong por repuŝi la nigran venton de ekonomiiismo kaj lanĉi ideologian batalon por elimino de individuismo kaj starigo de kolektivismo. Sekve, sub instigado de la revoluciaj ribeluloj, leviĝis en la tuta fabriko alta tajdo de tiucela lernado de la “tri malnovaj artikoloj”.

Ilin lernis ankaŭ la veterana laboristo Ĝong Ŝaŭŝan kune kun la aliaj kamaradoj de la Kvara Grupo de la Reakciila Branĉ-fabriko. Li eldiris sian komprenon: “Ĝang Side servis la popolon komplete kaj senrezerve, kaj Bethune zorgis nur pri la aliaj, sed neniam pri si mem. La martiriĝintoj por la revolucio ne damaĝis oferi sian vivon. Lernante de ili, ni devas forĵeti nian egoismon kaj ĝin anstataŭigi per kolektivismo. Oni faras revolucion ribelon ja ne por mono, kaj por mono oni ne povas konduki revolucion ribelon.”

La penso de Maŭ Zedong prilumis la korojn de la kamaradoj el la Kvara Grupo, kaj ili sukcese rezistis la atakon de la nigra vento de ekonomiiismo.

La laboristoj de la branĉaj fabrikoj kaj diversaj grupoj sin edukis per rememoro pri la amara pasinteco kaj komparo de la nuna feliĉo kun la mizero en la malnova socio. Veteranaj laboristoj eldiris la tragikan sorton, kiu trafis laboristaron en la malnova socio. Ili diris: “En la malnova socio, ni laboristoj estis piedpremataj, kaj povis nur lasi larmojn flui sur la brusto. Ni penlaboris vivoriske dekelkajn horojn en ĉiu tago, sed la salajro, kiun ni ricevis, neniel povis vivteni eĉ la familion el du personoj. Post la Liberiĝo ni vivas de tago al tago plifeliĉe, kion ni ŝuldas al Prezidanto Maŭ kaj la regpotenco tenata de ni laboristaro. Sed en nia fabriko plenmano da personoj irantaj la kapitalisman vojon enmanigis la potencon. Ili ne prizorgis la vivon de ni laboristoj, kial nun ili estas tiel malavaraj? Ili deziras konservi sian pozicion kaj spliti la vicon de nia laboristaro. Unuvorte, ili intencas strangoli la grandan proletan kulturalan revolucion. Ni neniel devas forgesi la mizeran pasintecon, la interesojn de la Partio kaj la popolo, kaj la estontecon de la ŝtato. Ni nepre devas sekvi Prezidanton Maŭ tuj poste por konduki



la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino.”

Dank’ al fervora propagando fare de la revoluciaj ribeluloj, la malmultaj laboristoj, kiuj estis portempe trompitaj, rekonsciiĝis. Iu laboristo sentis sin peze malgaja kvazaŭ kun ŝtono sur la koro, post kiam li akceptis la aldonan salajron. Li pensis: La granda kultura revolucio nun kondukata estas politika batalo, sed ne la ekonomia. Per akcepto de la pago oni falus en la kaptilon de la potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj transformus la seriozan batalon de politiko en batalon de ekonomio. Kiel oni povas bone fari la grandan kulturalan revolucion, se la koro okupiĝas nur pri mono? Ne, la pagon ni ne devas akcepti! Kiam li iris deĵori sekvantan matenon, li tuj redonis la monon.

Portinte hejmen la aldonan salajron, iu laboristo

de la Oksigen-laborejo, pensadis pri la vortoj de Prezidanto Maŭ kaj en lia penso akra batalo prenis lokon: Prezidanto Maŭ plej forte subtenas la revoluciajn ribelulojn, kaj ĉi tiuj plej bone aŭskultas Prezidanton Maŭ. Kiel maldankemaj ni estus al Prezidanto Maŭ, nia amata, se ni lasus nin trafigi per sukertegita obuso de la malamiko! Neeble, la monon mi nepre devas redoni! Li diris: “Tio ĉi ne estas problemo pri redono de kelka mono, sed pri elmonro de revolucia koro de nia laboristaro al la Partio kaj Prezidanto Maŭ!”

Tiuj, kiuj prenis monon, ĝin redonis; tiuj, kiuj volis veturi por interkontaktado, iris labori en la laborejo. La nigra vento de ekonomiismo ekblovita de la malamikoj estas forbatita de la revoluciaj ribeluloj. Ili gajnis plenan venkon en la batalo kontraŭ la nigra vento de ekonomiismo en la Reakciila Ĉeffabriko.

---

## Por Referenco

Ekonomiismo estas ismo kontraŭ marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Ĝi estas komplete kontraŭrevolucia kaj reviziisma.

Ekonomiismo sin adaptas al psiko de la postrestantoj el la amasoj, ĝi korodas la revolucionan volon de la amasoj per subaĉeto kaj kondukas ilian politikan batalon al la erara vojo de ekonomiismo. Alivorte, ĝi postulas, ke la proletaro batalu nur por pliiĝi al si iom da salajro kaj bonstatigo, ke ĝi zorgu nur pri provizoraj interesoj de individuoj, sed ne pri la longdaŭraj radikaj interesoj de la tuta proletaro, kaj ne faru politikan batalon por realigo de socialismo kaj komunismo.

Sub la sistemo de kapitalismo, ekonomiismo estas instrumento por protekti la reakcian kapitalisman regadon kaj oponi la proletan revolucion. Dum sia kritiko kontraŭ la rusa “ekonomiistaro”, Lenin montris, ke laŭ la rimedo uzata de ekonomiismo, la kapitalisma sistemo neniam povas esti renversita kaj la laboristoj povas nur por ĉiam esti sklavoj de la kapitalistoj. Li asertis, ke la tasko de la komunista partio estas inokuli marksismon al la laboristoj, plialtigi ilian politikan konscion por ke ili memkonscie leviĝu por entrepreni proletan revolucion kaj renversi la kapitalisman sistemon.

Des pli reakcia estas ekonomiismo sub la sistemo de socialismo. Ĝi estas instrumento por la kontraŭ-revolucia restarigo de kapitalismo. La modernaj reviziistoj kun Ĥruŝĉov kiel reprezentanto plenergie predikas kaj disvastigas ekonomiismon. Ili neigas la ekziston de klasoj kaj klasbatalo en la socialisma socio kaj neigas la necescon de la proleta diktaturo. Ili distrumpetas pri materia stimulo kaj pledas por la komando de monbiletoj. Ili energie logis homojn strebi al individuaj ekonomiaj interesoj, kaŭzante liberan inundon de la burĝa ideologio por detruji la socialisman sistemon kaj puŝante Sovetunion suriri la vojon de kapitalisma restarigo.

Vintre de la jaro 1966, kiam la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio gajnis brilan venkon, kaj la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, jam komencis disfali sur ĉiuj frontoj, ili ne volas esti pereigitaj kaj morte baraktis. Ili elprenis el rubejo de la nova kaj malnova reviziismoj la forĵetajon — ekonomiismon, eklevi la nigran venton de ekonomiismo, vane intencante lanĉi per ĝi novan reatakon kontraŭ la proleta revolucia linio kaj strangoli la grandan proletan kulturalan revolucion. Sed ilia intrigo estas baldaŭ frakasita de revoluciulaj ribeluloj.

# Deprenu la Potencon de

## “Egoismo”

**L**A organizaĵoj de proleta revoluciularo en nia lando nun estas entreprenantaj batalon por potencdepreno sur du frontoj, t. e., unuflanke, efektiviĝi la grandan unuiĝon de proleta revoluciularo kaj depreni la potencon de potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj aliflanke, depreni la potencon de “egoismo” en la kapo de revoluciularo. La antaŭa estas granda direkto de la movado de granda proleta kultura revolucio, kaj la lasta estas premiso de granda unuiĝo de la vicaro de revoluciularo kaj plej grava garantio por sukcese depreni kaj teni la potencon.

La rezista forto en la granda unuiĝo kaj granda potencdepreno fare de proleta revoluciularo venas ĉefe de la potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj la obstinuloj persistentaj ĉe la burĝa reakcia linio. Vidinte la alvenon de sia fino, ili certe faros vivspitan lukton kontraŭ ni per “dekobla penado”. Krome, la rezista forto venas ankaŭ de la malnovaj rutinaj fortoj de la socio. La influoj kaj restaĵoj de la malnova socio kaj malnova ideologio, kaj la pensfluo de burĝaro kaj etburĝaro ankoraŭ troviĝas ĉe la revoluciularo, tio signifas, ke en ilia kapo la proleta ideologio ankoraŭ ne elradike deprenis la potencon de “egoismo”. Tio estas malhelpo al la granda unuiĝo kaj granda potencdepreno fare de la revoluciularo.

En la revolucia periodo, precipe en ĝia decidiga momento, la revoluciuloj devas esti kuraĝaj en depreno de la potenco de “egoismo” en sia kapo. Alie estos portitaj al la revolucio neripareblaj perdoj.

En la kriza momento de la granda unuiĝo kaj granda potencdepreno fare de la proleta revoluciularo, se la revoluciaj ribeluloj ne frakasus “egoismon”, nek ĝisfunde deprenus ĝian potencon, nek starigus en si kolektivismon, sed lasus la liberalismon, anarkiismon, montpintismon kaj sektismon svarme elkuri, do dekadencos la batalvolo de nia vicaro, disdividiĝos nia organizaĵo, tiel ke la granda unuiĝo de la proleta revoluciularo alfrontos vicon post vico da baraĵoj kaj la revolucio iros al malvenko.

Se la revoluciaj ribeluloj permesus la inundon de “egoismo”, tre povus esti, ke ili perdos sian direkton en la batalo de potencdepreno kaj estos utiligitaj de

la malamikoj kaj trafitaj de la intrigo de malamikoj kiuj klopodas por semi malakordojn. Tio dolorigos la intimulojn kaj ĝojigos la malamikojn.

En la potencdepreno, sen forta batalo kontraŭ “egoismo” oni ne povas distingi la pravon disde la malpravo rilate al principaj problemoj, nek vere preni la fundamentan intereson de proletaro kiel sian deirpunkton, kaj perdos klasan analizon kaj la principojn de revolucio. Rezulte de tio, tre povas esti, ke la potenco ne estas vere tenata en la manoj de revoluciaj maldekstruloj.

Se la proleta revoluciularo ne decideme kondukos sur la ideologia kampo la batalon por forigi egoismon kaj starigi kolektivismon post ilia depreno de la potenco, ĝi povos esti denove perdita.

Nur se la proleta ideologio firme tenas la potencon en la kapo de la revoluciaj ribeluloj, la partia, administra, financa kaj kultura potencoj en niaj manoj povas vere, plene kaj ĝisfunde reprezenti la intereson de la proletaro kaj servi al ĝi. Alie, ni ne povas ĉirkaŭpreni la estontecon en nia vido, ne povas ĝisfunde detruigi la burĝajn diktaturajn instituciojn konservitajn de plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj ankaŭ ne povas krei tute novan, vivpovan regpotencon kun tipo de la Pariza Komunumo kaj konforman al nia socialisma ekonomia bazo. Tiel ni eble estos memkontentaj pri la malmulto da atingoj antaŭ nia nazo kaj fine ĉesigos la revolucion duonvoje.

Nur kiam la proleta ideologio estos depreninta la potencon de “egoismo” en nia kapo, ni ne estos konfuzitaj de la “flatado” de malamikoj, nek trafitaj de iliaj obusoj sukertegitaj, kaj ni estos ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj lia revolucia linio, neniam degeneros kaj ĉiam konservos en ni revolucion junecon.

Citadelo estas plej facile konkerita de ĝia interno. Tion diras al ni la instruo pri la degenerado al reviziismo fare de la gvidanta kliko de la Komunista Partio de Sovetunio, la historio de klasbatalo dum la pasintaj 17 jaroj en nia lando kaj la historiaj spertoj de la internacia proleta diktaturo. La klasaj malamikoj ĉiam klopodas per ĉiuj manovroj por serĉi siajn agentojn en nia vicaro. Ili artifikas treni niajn kamaradojn en la malamikan

# en la Kapo

tendaron aŭ enŝteliĝi en niajn vicojn, praktikas molajn kaj malmolajn taktikojn, flatas nin per troaj laŭdoj aŭ allogas nin per frandaĵoj por korupti nian animon kaj fari batalon de potenceprenado en la fundo de nia animo. En la tago, kiam la intrigo de la burĝaro sukcesos, neeviteble okazos kontraŭrevolucia restariĝo tra la tuta lando, la marksist-leninista partio sendube fariĝos reviziisma aŭ faŝisma partio, kaj la tuta Ĉinio ŝanĝos sian koloron. Konduki la batalon de potenceprenado en nia kapo estas grava afero, kiu koncernas la sukceson aŭ malsukceson de la granda kultura revolucio, la estontecon de ĉina revolucio kaj la sorton de la tutmonda revolucia popolo!

La klasbatalo trairas la tutan historian periodon de socialismo. Socia ekzisto decidas socian konscion. La klasbatalo nepre speguliĝas en niaj vicaro kaj ideologio. Jen estas alternativo, aŭ la proletaro praktikas diktaturon kaj deprenas la potencon de burĝa ideologio, aŭ la burĝa ideologio deprenas la potencon de proleta ideologio, kaj la burĝaro praktikas diktaturon.

Por depreni la potencon de "egoismo" en ni mem, ni devas, dum la klasbatalo de granda potenceprenado en la socio, kreive studi kaj kreive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ, esti kuraĝaj en memkritiko kaj malkaŝado de kontraŭdiroj, esti modestaj kaj singardemaj, deteni nin de fiereco kaj malpacienco, ne apogi nin sur antaŭaj atingoj, ne ĉasi famon kaj profiton, kaj eviti luksemon kaj sinmontremon. Ni ankaŭ devas longtempe hardi nin en nia kunligo kun laboristoj kaj kamparanoj. Nur tiel ni povos starigi firme en nia kapo la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, igi la proletan ideologion teni potencon stabile en nia kapo kaj kulturi nin kiel vere fidindajn daŭrigantojn de komunismo. Tio estas la plej grava afero de revolucio por cent, mil, eĉ dekmil jaroj!

Ni devas respondi la alvokon de k-do Lin Biaŭ igi centmilionojn da popolanoj posedi la penson de Maŭ Zedong, igi la penson de Maŭ Zedong okupi ĉiujn ideologiajn kampojn, ŝanĝi la spiritan fizionomion de la tuta socio per la penso de Maŭ Zedong kaj fari la grandan spiritan forton de la penso de Maŭ Zedong granda materia forto!

# Heroaj Vortoj de la Revoluciaj Ribeluloj

☆ Tio, kion ni laboristoj volas, estas revolucio sed ne monbiletoj. Neaĉetebla estas la ruĝa koro de ni, revoluciaj ribeluloj.

☆ "Blanka teroro" ne povas nin timigi kaj "sukertegitaj obusoj" ne povas nin faligi. Kiu ja volus ilian malpuran monon! Tio, kion ni volas, estas socialismo.

☆ Ne moveblaj per mono, nek depuŝeblaj per kontraŭfluo, la revoluciaj ribeluloj estas revoluciuloj kiuj vere sekvas la vortojn de Prezidanto Maŭ!

☆ Ni, revoluciaj ribeluloj, firme tenas politikon en komando kaj decideme oponas meti monbiletojn en komandon. Ni ja ĝuste volas sekvi la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "**firme teni la revolucion kaj stimuli la produkton**" kaj ĝisfunde frakasi ekonomismon!

☆ Se hodiaŭ oni estus logita de ia bonstatiga aŭ ekonomia profito, morgaŭ oni sin trovus en kateno de kapitalismo; se hodiaŭ oni ne faligus ekonomismon, al milionoj da homoj falus la kapo sur la teron en la estonteco.

☆ Ni estas firmaj revoluciaj ribeluloj, avangardo en firma tenado de la revolucio kaj modeloj en stimulado de la produkto.



HUNAN:

# Ĉe la

*Alte tenante la ruĝan libreton Vortoj de Prezidanto Maŭ, la albanaj batalamikoj foje post fojo kriis laŭte: Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu k-do Enver Hoxha!*

*Je la 22-a de decembro 1966, la Ŝtata Kanta-danca Ensemblo de la Popola Respubliko de Albanio, konsistanta el 61 personoj sub la gvido de la estro P. Pejo kaj vicedstro R. Hado alvenis al Ĉinio por gastludi laŭ la Plenuma Projekto de 1966 de la Kultura Interkonsento inter Ĉinio kaj Albanio. Dum sia prezentado ĝi ricevis varmajn bonvenigojn de la Partio kaj Registaro, vastaj revoluciaj ribelantaro kaj amaso, junaj ruĝaj gvardianoj kaj la Popola Liberiga Armeo de nia lando. La jena artikolo raportas al niaj legantoj la neforgeseblan scenon dum la vizito de la ensemblo al Ŝaŭŝan, Hunan-provinco — la hejmloko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.*

*Ho loko, de kie leviĝas la ruĝa suno,  
Kiel sopiras vin la popoloj,  
Al vi turniĝas milmiloj da ruĝaj koroj,  
Al vi sin direktas centmilionoj da okulparoj.  
Ho, Ŝaŭŝan!  
Vi estas de Prezidanto Maŭ la hejmloko,  
La loko de kie leviĝas la ruĝa suno.  
Trans sennombraj akvoj kaj montoj,  
Kun ruĝaj standardoj alte en la manoj,  
Al Ŝaŭŝan venas revoluciuloj,  
Por ĉerpi revolucion forton.*

...


Kun senlimaj amo kaj respekto al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj arda deziro ĉerpi revolucion forton, nia plej intima batalamiko kaj kamarado — la Ŝtata Kanta-danca Ensemblo de Albanio vizitis Ŝaŭŝan en Hunan-provinco — la hejmlokon de Prezidanto Maŭ, je la 25-a de januaro.

Kiam la albanaj kamaradoj surpaŝis la teron de Ĉinio, ili jam sopiris viziti la hejmlokon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tiutagan matenon multaj el ili ellitiĝis tre frue kaj atendis la ekveturon. Iuj diris: “Kiel bone, se mi havus flugilojn!”

Dum la veturado al Ŝaŭŝan, la albanaj kamaradoj laŭte kantis jen *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direkttilisto*, jen *Vivu Prezidanto Maŭ* en la ĉina lingvo — vojaĝantoj, gajaj kantoj; sur la vojo, ĉiam ĝojo.

Kiam la albanaj kamaradoj atingis Ŝaŭŝan, pli ol okdek mil apudvoje atendantaj ruĝaj gvardianoj longmarŝaj el diversaj lokoj de la patrio kaj Ŝaŭŝan-aj popolanoj, alte tenante ruĝajn libretojn *Vortoj de Prezidanto Maŭ* kaj swingante ruĝajn flagojn, plengorĝe kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Vivu Kamarado Enver Hoxha!” “Vivu la batala amikeco inter Ĉinio kaj Albanio!” Kiam la albanaj kamaradoj alproksimiĝis, sennombraj manoj etendiĝis al ili por donaci al la intimaj batalamikoj siajn ŝatatajn verkojn de Prezidanto Maŭ, insignojn kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj Ŝaŭŝan-insignojn.

*La albana batalamiko kantas por la revolucia popolo de Ŝaŭŝan kaj la ruĝaj gvardianoj, kiuj alvenis tie post longa marŝo, la kanton kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ: “Ni Devas Fidi al la Amaso, kaj Ni Devas Fidi al la Partio.”*



# Loko Kie Leviĝas la Ruĝa Suno

## Noto pri la Vizito de la Ŝtata Kanta-danca Ensemblo de Albanio al Ŝaŭŝan

Kiel emociiĝis la albanaj kamaradoj! Forte swingante ruĝajn libretojn *Vortoj de Prezidanto Maŭ* ili foje-refoje ĝojkriis en la ĉina lingvo: “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” Iu aktoro, ricevinte fontoplumon kun gravuritaj vortoj “Vizito al la Hejmloko de Prezidanto Maŭ”, emociite diris: “Tio ĉi estas plej valora donaco! De nun dum skribado mi ekpensos pri granda Prezidanto Maŭ kaj lia hejmloko kaj ekhavos neelĉerpeblan forton por revoluciado!”

Post la atingo de Ŝaŭŝan, la albanaj kamaradoj senripoze alvenis al la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ kun verdaj pinoj kaj bambuoj ĉirkaŭe. Ili detale rigardis ĉiun objekton ekspozitan en ĝi, kaj multaj kamaradoj karesis kaj rigardis aparte tiujn kiujn Prezidanto Maŭ iam uzis. Sur iliaj vizaĝoj radiis feliĉa rideto. Iu juna kantisto, vidinte la antaŭan dormoĉambron de Prezidanto Maŭ kaj la tablon, seĝon kaj skribilojn en ĝi, dumtempe uzitajn de Prezidanto Maŭ en lia diligenta studo de revolucia teorio, ekscitite diris:

“La revolucia aktivado de Prezidanto Maŭ en la juneco estas imitinda modelo por ni junularo. Mi nepre sciigos senrezerve al la albanaj junuloj tion kion mi nun ellernis.”

La albanaj kamaradoj kun atento aŭskultis la klarigojn de eksplikistoj kaj detale pririgardis la fotojn kaj objektojn spegulantajn tiutempan revolucion aktivadon de Prezidanto Maŭ. Ili kun plena respekto kortuŝiĝis informiĝinte ke ses familianoj de Prezidanto Maŭ brave martiriĝis por la liberiga afero de la popoloj de Ĉinio kaj la tuta mondo. Antaŭ la portretoj de la ses martiroj ili staris korinkline ne volante foriri.

La grandaj revoluciaj teorio kaj praktiko de Prezidanto Maŭ profunde kortuŝis la albanajn kamaradojn. La ensembla estro P. Pejo diris: “Ĉiu vera revoluciulo nepre devas koni la vivon kaj revolucion aktivadon de la grandaj gvidantoj de proletaro, koni tiujn de kamarado Maŭ Zedong. Kamarado Maŭ Zedong estas granda gvidanto kaj





*La albanaj gekamaradoj vizitas la ekspozojn de la antaŭa loĝejo de k-do Maŭ Zedong.*

granda marksist-leninisto. Li estas ne nur la granda gvidanto de la ĉina popolo, sed ankaŭ la granda elstara marksist-leninisto de la internacia komunisma movado.” Multaj kamaradoj diris: “La penso de Maŭ Zedong estas lampo, kiu lumigas al la revoluciaj popoloj de la mondo.”

La albanaj kamaradoj varme laŭdis la grandan proletan kulturen revolucion iniciatitan kaj gvidatan persone de Prezidanto Maŭ. La ensembla estro kamarado P. Pejo diris: “La granda proleta kultura revolucio celas konduki la socialisman revolucion ĝis la fino. Ĝi estas bezonata por la ĉinaj socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, favora al la kontraŭimperiisma kaj kontraŭreviziisma batalo fare de diverslandaj popoloj por la naciaj sendependeco kaj liberigo, kaj favora al la monda revolucio.” Li diris: “Tiu ĉi granda kultura revolucio havas grandan historian signifon. Ni deziras al vi kompletan venkon!”

Dum sia vizito de Ŝaŭŝan, la albanaj kamaradoj okazigis amikan kunvenon kune kun la revoluciaj popolanoj de Ŝaŭŝan kaj ruĝaj gvardianoj longmarŝaj el diversaj lokoj de la lando. Kiam ruĝaj gvardioj de Ŝaŭŝan kaj de aliaj lokoj prezentis al la albanaj batalamikoj tri helruĝajn gvardiajn standardojn, dekmiloj da ruĝaj gvardianoj jubilis kaj saltegis, alte tenante ruĝajn libretojn *Vortoj de Prezidanto Maŭ*, foje-refoje ĝojkriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Vivu Kamarado Enver Hoxha!” Ili gaje kantis ripete *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktlisto*. Kamarado P. Pejo tre emociite diris al la ruĝaj gvardianoj: “Vi ĉiuj

ne timas malfacilojn kaj lacon, multaj kamaradoj piediris mil liojn por alveni ĉi tien. Mi volas diri al vi: Ni, albanaj kamaradoj, ankaŭ ne timas malfacilojn kaj lacon. Mi proponas: Nun ni kune surgrimpu Ŝaŭ-monton!”

Apenaŭ kamarado P. Pejo finis sian parolon, en la kunvenejo tuj leviĝis tondra manklakado kaj ĝojkrioj. Tiam kamarado P. Pejo ekmarŝis antaŭe, alte tenante standardon de ruĝa gvardio kaj la junaj ruĝaj gvardianoj lin sekvis tuj poste. La albanaj kamaradoj senĉese laŭtkriis en la ĉina lingvo: “**Faru firman decidon, timu neniam oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**” La junaj ruĝaj gvardianoj, kantante kantojn kun vortoj de Prezidanto Maŭ, kuris rekte al Ŝaŭ-monto!

Post ĉirkaŭ unu horo, kamarado P. Pejo, parto el la ensemblanoj kaj miloj da ruĝaj gvardianoj atingis la kulminon de Ŝaŭ-monto. Kaj tuj eksonis tamtamoj kaj tamburoj sur la montpinto, “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Vivu Kamarado Enver Hoxha!” Penetris la ĉielon la ĝojkrioj kaj la kanto *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktlisto*.

La albanaj kamaradoj pasigis neforgeseblan tagon en Ŝaŭŝan. La ensembla estro P. Pejo diris: “Tiu ĉi vizito havas ekstreme profundan signifon, ni la tuta ensemblo ĝin neniam forgesos.” Iuj membroj de la ensemblo diris: “Hodiaŭ estas la plej feliĉa kaj neforgesebla tago dum mia tuta vivo. Post mia reveno al patrio kiel gratulo la unua afero por mi estos raporti al nia albana popolo la ĝojigan viziton al Ŝaŭŝan — la hejmloko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!”

# Heroo de Albanio—Adem Reka

## —Korespondaĵo el Albanio

**L**ASTATEMPE en heroa Albanio cirkulas rakonto pri heroaĵo de granda komunisma batalanto Adem Reka, kiu sin oferis por la ŝtato.

### Brava Luktado kun Uragano kaj Teruraj Ondegoj

Adem Reka estis havena arganisto de Albanio.

La 17-an de novembro, 1966, furioza uragano kaj pluvego, tre maloftaj en la historio, atakis la faman havenon Durres de Albanio. Tiam muĝis la uragano, pluvegis kiel el sitelo, ruliĝadis ondegoj en la haveno, la plej granda naĝargano, kies levpovo estis 120 tunoj, ŝanceliĝadis pro la uragano kaj ondegoj kaj ĉiam estis minacata de danĝero de falo.

Tiam Reka vekiĝis el profunda dormo post deĵorado, pro la abruptaj uragano kaj pluvego. Ekpensinte pri la sekureco de la instalaĵoj ĉe la haveno, li tuj metis sur sin la vestojn kaj kuris al la haveno. Suririnte sur la arganon, li tuj kuraĝe ekbatalis kun aliaj kamaradoj kontraŭ la uragano kaj teruraj ondegoj, riskante sian vivon.

La uragano ĉiam pli furioziĝis, la pluvego fariĝis pli kaj pli forta, la ondegoj pli kaj pli altiĝis. Atakate de la fortega fluo, rompiĝis ses el la sep kabloj, kiuj fiksis la naĝarganon. La argano forte ŝanceliĝis kaj troviĝis en krizo. Sola ideo okupis la penson de Reka kaj aliaj kamaradoj: nepre venki la furiozajn pluvegon kaj uraganon, defendi la plej grandan naĝarganon de la haveno Durres kaj sekurigi la ĉirkaŭajn ŝipojn. Kiam ili apenaŭ sukcesis ligi la kablojn al la bobenego sur la argano, ondego faligis Reka sur la ferdekon. Sed li fortostreĉis, restariĝis kun vundita korpo kaj daŭrigis la batalon.

La uragano kaj pluvego neniom malfortiĝis. Kiam Reka sekurigis la instalaĵojn sur la ferframo de la argano, li trovis, ke alia rompita kablo estis glitanta en la maron de sur la ferdeko. Kriante “Kamaradoj, kaptu ĝin”, li saltis de sur la ferframo kaj tutforte ĝin tenis kune kun alia kamarado. Sangis la manplatoj, sed kio gravas! Per la tuta forto ili trenis la kablon kaj ligis ĝin sur la bobenego.

Sed ĝuste tiam la argano forte ŝanceliĝis pro granda ondo, Reka estis forte batita de la kablo kaj grave vundita je la kapo kaj talio.

Kiam oni sendis lin en hospitalon, li ankoraŭ kriadis senkonscie: “Kamaradoj, ne zorgu min, savu la arganon!” La kuracistoj faris grandan klopodadon por savi la komunisman batalanton, kiu oferis sin por la ŝtato, sed vane, kaj pro la gravega vundo li heroe mortis en la sama tago.

### Tutkore por la Revolucio


La trideknaŭ-jara Reka estis mizera orfo en sia knabeco. En la malnova socio vizitinte lernejon nur kvar jarojn li fariĝis metilernanto. Poste sub la flegado kaj edukado de la Albana Partio de Laboro, li aliĝis al la subteraj organizoj Juna Pioniro kaj Komunisma Junulara Ligo, kun klasa malamo al la bienuloj kaj kapitalistoj, kaj nacia malamo al la germana kaj itala faŝismo. Dum la okupado de malamikoj, li multfoje skribis per karbokrajono: “Faŝismo nepre pereos, la popolo nepre liberiĝos!” kaj aliajn patriotismajn kaj kontraŭimperiismajn sloganojn sur la muroj de la stratoj en la urbo Durres, sub la regado de blanka teroro. Li ankaŭ kun aliaj junuloj helpis subterajn laborantojn puni patriperfidulon. Ankoraŭ ne atinginte aĝon de dek kvin jaroj, li jam partoprenis partizanan taĉmenton kaj heroe batalis por la liberigo de la patrolando.

La revoluciajn laborojn Reka ĉiam faris entuziasmoplene kaj neniam pensis pri sia persona gajno. Li faris ĉion, kion la Partio komisiis al li. Li iris ĉien ajn, kien la Partio bezonis lin. Post la liberigo de la patrolando li aktive partoprenis la volontulan laboron de fervoja konstruo responde al la alvoko de la Partio de Laboro por restarigi la ekonomion detruitan de la milito. En la jaro 1947, li glorie estis sankciita kiel partiano pro sia elstara konduto en politiko kaj laboro. Kiam la Partio de Laboro alvokis rekonstrui la havenon Durres en 1949, li revenis al la haveno por labori tie.

Reka ĉiam opiniis plezura afero helpon al aliaj kaj zorgis aliajn pli multe ol sin mem. Iun frostan nokton, iu falis en la akvon de la haveno. Aŭdinte helpo-krion li senhezite saltis en la glacie malvarman akvon kaj elakvigis la falinton. Kvankam lia tuta korpo purpurigis pro malvarmo, sed kiam la savito esprimis al li dankon, li diris ridetante: "Ne dankinde, mi faris nur kion mi devas." Kvankam Reka estis arganisto, sed li ofte helpis en laboro maristojn, maŝinistojn, elektristojn, ŝarĝportistojn kaj kuiristojn kaj ricevis iliajn laŭdon kaj estimon ĝenerale.

Reka estis eminenta membro de la Albana Partio de Laboro kaj firma revolucia batalanto. En la jaro 1966, la Centra Komitato de la Partio de Laboro elmetis serion da gravaj revoluciigaj rimedoj. Li firme respondis al la alvoko de la Partio, elmetis multe da revoluciigaj proponoj en sia laborunuoj, kaj detruis la malnovajn regulojn kaj sistemojn kune kun ĉiuj kolegoj, tiel ke plene disvolviĝis la aktiveco kaj kreiva spirito de la vasta amaso de oficistoj kaj laboristoj. Reka aparte atentis la malkaŝon kaj kritikon pri la perfidula vizaĝo kaj reakcia agado de restarigo de kapitalismo

*Per sia tuta forto li firme tenas la kablajn kaj herojn kontraŭ la ŝtormo kaj insidaj ondoj.*



fare de la sovetia reviziisma gvidanta kliko kaj tre firme klopodis elimini kaj preventi la influon de reviziismo kune kun aliaj kamaradoj.

### Reka Eterne Vivas en la Koro de la Popolo

La fundamenta kialo, ke Reka fariĝis nobla homo, servanta la popolon tutkore kaj tutanime, kuŝas en tio, ke li ofte memkonscie armis sin per la penso de marksism-leninismo, senĉese levis sian politikan konscion kaj ĉiam elstarigis politikon.

Li pene studis verkojn de kamarado Enver Hoxha, la estimata kaj amata gvidanto de la albana popolo. Li ĉiam bone memoris la instruon de kamarado Hoxha: "Ni membroj de la revolucia partio devas... decideme servi al la Partio kaj popolo ĉiam kaj sub ĉia ajn kondiĉo ĝis la morto, kaj esti pretaj fari ĉiam oferon por la interesoj de la revolucio kaj socialismo."

Kamarado Reka senlime adoris kaj amis prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la ĉina popolo kaj la ruĝan sunon en la koro de la tutmonda popolo.

Li serioze studis *Elektitajn verkojn de Maŭ Zedong*, kaj ofte ĉerpis el ĝi instruojn kaj fortojn.

Reka tre estimis Lej Feng, la grandan komunisman batalanton de Ĉinio, armitan per la penso de Maŭ Zedong. Li metis sur la tablo en sia dormoĉambro librojn kaj revuojn, en kiuj troviĝis rakontoj pri heroaĵoj de Lej Feng, kaj ofte ilin legis.

En simpla laboro Reka kontribuis sian forton ankaŭ al la firmigo de la amikeco inter Albanio kaj Ĉinio. Li ofte diris al siaj kolegoj: "La frata ĉina popolo sendis al ni tre karajn materialojn por konstruo, ni devas deŝarĝi plej rapide kaj plej zorge." Iufoje unu varkesteto falis en la maron, li tuj ensaltis kaj ĝin elakvigis. Unu tagon antaŭ lia morto li ankoraŭ ŝarĝis kaj deŝarĝis kune kun ĉinaj maristoj kaj interparolis senĝene pri la amikeco inter Albanio kaj Ĉinio.

Adem Reka estis eminenta membro de la Albana Partio de Laboro kaj bona filo de la laboranta popolo. Li mortis por la interesoj de la popolo. La 13-an de decembro 1966, la Prezidantaro de la Albana Popola Parlamento faris decidon: agnoski lin postmorte "socialisma heroo de laboro". Laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj junuloj el la tuta lando seninterrompe vizitadis la havenon Durres, kie Reka laboris antaŭe. Kvankam la granda komunisma batalanto Adem Reka forlasis nin por ĉiam, sed en la koro de la albana popolo eterne vivos lia brila ekzemplo en tutkora servado al la kolektiva intereso, al la revolucio kaj popolo.



# Nuntempaj “Malsaĝaj Avoj”



La komunumanoj studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ* dum ripozhoro.

La membroj de Ŝaŝiju-brigado de Juegeĝuang-a Popola Komunumo en Zunhua-gubernio, Hebej-provinco, estas admirataj kiel nuntempaj "malsaĝaj avoj".

Sen la Komunista Partio, ne estus la hodiaŭo de Ŝaŝiju; sen la penso de Maŭ Zedong, ne estus la glora titolo nuntempaj "malsaĝaj avoj". Antaŭ la Liberiĝo, Ŝaŝiju estis montvalo famekonata pro sia malriĉeco, kie "tero raras kiel perloj kaj la akvo kiel la oleo; ĉie sur la tero kaj sur la montaro estas grandaj ŝtonoj". Post la Liberiĝo, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ kaj apogante sin sur la kolektiva forto kaj la vastaj amasoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la Ŝaŝiju-anoj en la spirito de la "malsaĝa avo", kiu translokigis montojn, hakis montojn kaj konstruis kampojn. Pere de la studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo. Rememore al Norman Bethune kaj Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, la vastaj amasoj de komunumanoj eliminis la egoismon en sia kapo kaj starigis kolektivismon, kaj sin remuldis, armis, flegis per la penso de Maŭ Zedong. Ili transformis montdeklivojn kun tero dika nur je kvar coloj en ŝtuparajn kampojn, kaj ili nun ĉesas esti brigado, al kiu mankas greno, sed estas brigado kun supersufiĉa greno. Ili fosis putojn tra ŝtontavolo, konstruis sur la montoj akvokondukan fosajon kaj akvokonservejojn, plantis fruktarbojn inter ŝtonoj kaj verdigis la vastajn nudajn montojn per forstoj. Nun Ŝaŝiju jam fariĝis nova socialisma vilaĝo.

Haki montojn kaj dispecigi ŝtonojn por konstrui ŝtuparajn kampojn






Nova fizionomio de la ŝtuparaj kampoj

Maljunaj "Malsaĝaj Avoj"





Facile akirebla estas nun la akvo. (*supre*)

Novekonstruita akvokonservejo (*maldekstre*)

Junaj ruĝaj gvardianoj vizitantaj Ŝaŝiju (*malsupre*)



# *Heroa Maristo*

## *Hiong Jaŭĝang*

“**M**I armos mian cerbon kaj altigos la politikan konscion per la penso de Maŭ Zedong, por ke mi fariĝu senegoisma kaj penlaboradu konsciencie ĝis la lasta spiro por la popolo kaj revolucio.” Per siaj heroaj faroj la ŝipisto k-do Hiong Jaŭĝang, 21-jara komunisto kaj demobilizita armeano de PLA, efektivigis sian ĵuron skribitan en sia taglibro. Li oferis sian vivon por la ĉina revolucio kaj monda revolucio.

### **Batalo en Bak Bo Golfo**

Fruan matenon de la 29-a de aŭgusto, 1966, kun plena amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio, malgranda varŝipo N-ro 1018, kie laboris k-do Hiong Jaŭĝang, estis atakita de du usonaj pirataj aviadiloj dum sia vojaĝo laŭ la normala naviglinio sur la maro de Bak Bo Golfo. En la daŭro de tri horoj de arda batalo, la damnindaj usonaj pirataj aviadiloj alterne pafjetis raketojn, ke leviĝis akvokolonoj unu post alia ĉirkaŭ la ŝipo en pulvofumo. La heroaj ĉinaj gefiloj ne estis timigitaj de la freneza bombado de la malamiko. Hiong Jaŭĝang, kiu estis laboranta sur la posta ferdeko, subite estis supren ĵetita de aerondoj, kaj falis teren svenigita. Rekonsciiĝinte li tamen tuj revenis al la batalposteno, kaj nur post kiam la politika komisaro ordonis forlasi la ŝipon, li tion faris, dolore adiaŭinte la mortigitajn martirojn.

La nokto obskuris, kaj ondegaj muĝis. La malamikaj aviadiloj zumis kvazaŭ muŝoj. Kvankam vunditaj estis komunistoj Hiong Jaŭĝang kaj Hju Gjunĵuj, tamen ili finfine sukcesis gajni al si la taskon foreskorti la ŝipestron Huang Busan. La savfiloso prezentiĝis granda celaĵo, do ĉiumomente ĝin minacis la danĝero esti trovita kaj atakata de la malamikaj aviadiloj. Kiel ajn malalte flugis la malamikaj aviadiloj, kiel ajn forte frapis la ondoj, kaj kiel ajn frosta estis la akvo, ĉio ĉi tio ne povis timigi la heroojn. Ili tutforte naĝis kaj naĝis. La instruo de Prezidanto Maŭ “**faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**” ilin plenigis per kuraĝo kaj forto tiel ke ili ne sentis la doloron de la vundoj kaj la froston de la marakvo. Tio, kion ili pensis, estis ke la ĉinaj maristoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong povas nur venki la maron, sed ne esti venkitaj de ĝi. Puŝante la bambufloson, ili kuraĝe naĝis antaŭen spite al la vento kaj ondegaj, kaj fine atingis dezertan insulon. Ankaŭ kelkaj aliaj kamaradoj surteriĝis sur ĝin unu post alia.

### **Klasfrata Amo Marprofunda**

Tio estis senhoma sovaĝa insulo kie ili ne nur trovis nenion manĝeblan, sed ankaŭ ne akvon trinkeblan. En tiaj ekstreme malfacilaj cirkonstancoj, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “... **zorgi pri la Partio kaj popolamaso pli multe ol pri individuoj, zorgi pri aliaj pli multe ol pri si mem**”, la juna komunisto Hiong Jaŭĝang vere efektivigis sian ĵuron esti senegoisma. Por akiri manĝaĵon, li iris depreni sovaĝajn fruktojn, spite al pikado en dorozaj arbustoj. Por preventi eblan veneniĝon, li mem unue gustumis la fruktojn. Por akiri trinkeblan akvon, li transgrimpis monton post monto. Li demetis sian nuran jakon kaj per ĝi kovris la ŝipestron Huang Busan, kiu ricevis 39 vundojn. Li mem nudiĝis ĝis la talio kaj tremis pro frosto. Vidinte ke Huang Busan ne povis sin movi, li trinkigis lin per akvo guton post guto. Liaj plandoj estis frotvunditaj, liaj brakoj, brusto kaj dorso estis ŝirvunditaj de dornoj, tamen li neniam plendis, sed ĉiam iris kantante revoluciajn kantojn. Li diris: “Kvankam mia haŭto purpuriĝis pro la frosto, tamen estas tre varme en mia koro!”

Je la mateno de la 31-a de aŭgusto, akute graviĝis la vundoj de la kamaradoj. Tion vidante, Hiong Jaŭĝang sentis distranĉan doloron en la koro. Li plurfoje petis la partian filion permesi lin transnaĝi for por peti helpon. Li sciis, ke li ne estas tre lerta en naĝado kaj eble oferos sian vivon en la senlima maro. Tamen por savi la kamaradojn kaj batalamikojn li senhezite sin ĵetis en la maron ...

### **Nova Homo sub Nutrado de la Penso de Maŭ Zedong**

Ĉiuj vivestaĵoj kreskas dank’ al la suno, kaj la herooj ne povas kulturiĝi sen la penso de Maŭ Zedong. Hiong Jaŭĝang naskiĝis en familio mizera. Tri generacioj de liaj familianoj fiziklaboris kiel jardungitoj kaj almozadis, suferante ĉiajn ofendojn kaj insultojn. Pro tio li morte malamegis la damnindajn tiranajn bienulojn. En la fundo de la koro li amegis la savanton Prezidanton Maŭ, kaj kore li ŝategas legi verkojn de Prezidanto Maŭ. Li ofte diris ekscitite: “Tolvesto varmigas malpli ol pelto, sukero dolĉas malpli ol mielo kaj la amo de la gepatroj profundas malpli ol tiu de Prezidanto Maŭ!” En lia saketo ĉiam troviĝis verko

# “Tri Malnovaj Artikoloj”

## en Gramofona Disko

**D**ISKOJ de deklamo de la tri brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ, nome, “Servu al la Popolo”, “Rememore al Norman Bethune” kaj “Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo” jam estas elfaritaj de la Ĉina Fabriko de Gramofonaj Diskoj, Ŝanhajo.


En la pasinteco, la produktado de diskoj estis monopolata de plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj produktigis grandnombre malbonaj diskoj, kiuj disvastigis la putran ideologion de la burĝaro kaj feŭdismo. En tiu ĉi senprecedenca, granda proleta kultura revolucio, la vasta revolucia amaso en la Ĉina Fabriko de Gramofonaj Diskoj, kreive studas kaj kreive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, altigis sian klaskonscion, akrigis sian vidon kaj post intensa luktado faligis la potenctenantojn en la Partio de la Fabriko, kiuj iras la

kapitalisman vojon kaj forbalais ĉiujn demonojn kaj diablojn. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la tuta fabriko ĉiuj profunde komprenis, ke la gramofonaj diskoj ne devas esti kultura amuzajo, sed politika propagandilo, estas necese ke la penso de Maŭ Zedong ekokupu tiun ĉi batalpozicion. Komence de oktobro, 1966, ili faris kaj eldonis grandnombre gramofonajn diskojn propagandantajn la penson de Maŭ Zedong, el kiuj sin trovis diskoj de deklamo de la “Tri Malnovaj Artikoloj”, diskoj de kantoj kun teksto el vortoj de Prezidanto Maŭ, diskoj pri la reala stato de la trifoja akcepto de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj fare de Prezidanto Maŭ, la paroladoj de kamaradoj Lin Biaŭ kaj Ĝoŭ Enlaj en la akcepta mitingo de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj venintaj al Pekino el diversaj lokoj de la lando, kaj aliaj diskoj.

de Prezidanto Maŭ por legi. En lia notlibreto estis intermetita portreto de Prezidanto Maŭ, kiun li ĉiutage elprenis por rigardi. Li ŝatis legi verkojn de Prezidanto Maŭ, kvazaŭ delonge akvobezona plantido sopiras al pluvo. Kiam li estis batalanto de mara trupo, li kutimis reciti parkere vortojn de Prezidanto Maŭ kuŝante sur la lito, post kiam la lampoj de la militŝipo estis estingitaj. Kiam la militŝipo endokiĝis, li ĉiam iris sur la kajon por lerni sub la strata lampo, ofte ĝis profunda nokto. Iufoje, ilia militŝipo navigadis sur maro kaj forte skuigadis en ondegoj. Tio ege dolorigis Hiong Jaŭĝang, kiu suferis de kronika anusinflamo. Tamen, pendiginte la piedon per la tornistra rimeno por mildigi la doloregon, li ankoraŭ persistis lerni la “tri malnovajn artikolojn”.

Hiong Jaŭĝang vere mastris la tutan esencon de la “tri malnovaj artikoloj”, brave elstaris en la kriza momento, kaj oferis sian vivon por la revolucio. Kvankam kamarado Hiong Jaŭĝang heroe forpasis, tamen lia brila figuro de batalanto fidela al Prezidanto Maŭ, la penso de Maŭ Zedong kaj la popolo eterne vivos en la koro de la popolo!

*Lernante de la spirito de Norman Bethune esti komplete sindona al la aliaj sen ajna konsidero pri si mem, la 21-jara Hiong Jaŭĝang donis sian solan veston al vundito kaj mem iras serĉi dolĉan akvon kaj sovaĝajn fruktojn por la kamaradoj.*



# Dankon al Prezidanto Maŭ, ke Li Sendis al Ni Bonajn Kuracistojn

**N**OMBRO da anoj de la Ĉina Kuractrupo en Zanzibaro baldaŭ revenos al sia patrolando por deĵorŝanĝo. Kun korinklino de nedisiĝemo, zanzibaraj popolanoj vizitis la forirontojn por adiaŭo. Maljuna zanzibara laboristo Ŝaaban Khamisi, kies detranĉita mano estis sukcese malamputita de ĉinaj kuracistoj, diris al ili: “Kvankam vi foriros, ni tamen ĉiam vin tenos en nia memoro. Reveninte al Pekino, bonvolu transdoni al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ la dankojn kaj salutojn de ni, zanzibaraj laboristoj.”

La zanzibaraj popolanoj neniam forgesos la fervoran servadon de la Ĉina Kuractrupo al ili. Ili ankoraŭ memoras, ke post kiam ili renversis en januaro de 1964 la reakcian sultanon dinastion subtenatan de la britaj koloniistoj, ĉi tiuj subfosis la zanzibaran revolucion diversmaniere kaj subite retiris ĉiujn britajn kuracistojn laborantajn en Zanzibaro. Tiam laŭ peto de la zanzibara revolucia registaro, la ĉina registaro sendis al ĝi kuractrupon el dekkelkaj kuracistoj kaj flegistoj, kiuj atingis Zanzibaron en aŭgusto de la jaro post longa vojaĝo transoceana.

## Laŭ la Ekzemplo de la Internaciisma Batalanto N. Bethune

La ĉinaj medicinaj laborantoj, kiuj gravuris en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ, persistis ĉe kreiva lernado kaj kreiva aplikado de liaj verkoj kaj ĵuris fariĝi internaciismaj batalantoj, kia N. Bethune, estis ege respondecemaj en sia laboro kaj ege varmkoraj al la pacientoj. Ili sin rigardas kiel ordinarajn laborulojn, ofte helpis meminciate lokajn flegistojn kaj laboristojn injekti, helpi mal-sanulojn preni medikamentojn, faldi sanigan gazon

kaj purigi la hospitalon. En sia ĉiutaga laborado, ili neniam kalkulis la deĵortempon, ofte superlaboris la tempon por manĝo kaj dormo kaj iuj kamaradoj eĉ persistis labori spite al sufero de malsano. Indigenaj flegistoj ofte diris: “La ĉinaj kuracistoj ja ne scias lacon.”

La ĉinaj medicinaj laborantoj timis nek malpuron nek lacon, kaj kore prizorgis la pacientojn en ĉio. Ofte ili helpis pacientojn en manĝado kaj en bano kaj lavis por ili vestojn. Kiam pacientoj suferis de konstipo kaj kuraciloj ne efikis ĉe ili, tiam ĉinaj kuracistoj elprenis por ili la fekaĵbulojn per siaj fingroj por forigi ilian doloron. Multaj pacientoj diris: “La ĉinaj flegistoj estas bonegaj kaj nin traktas kvazaŭ karaj parencoj.” Laborante en la bebo-ĉambro, la ĉina ĉefflegistino ĉiam memoris la instruon de Prezidanto Maŭ “**labori senrezerve por la intereso de la popolo**” kaj ne sentis malinklinon al banalaj kaj bagatelaj laboroj. Tutan tagon ŝi nutris lakton al dekkelkaj antaŭtempaj naskitoj, ilin banis kaj ŝanĝis por ili urintukojn. Dank’ al ŝia zorga flegado kaj nutrado, iu nur dufunta antaŭtempa naskito saviĝis. Kiam la patrinoj de la beboj sciiĝis, ke la ĉina ĉefflegistino restigis sian bebon en Ĉinio por veni al la ege malproksima Zanzibaro por flegi iliajn bebojn, ili tre kortuŝiĝis kaj ame ŝin nomis “patrino de zanzibaraj infanoj”.

Foje, iu ĉina kuracisto vidis, ke grave malsana zanzibara maljunulo iras tre malfacile, li tuj lin portis surdorse supren en la atendejon de la supra etaĝo. La maljunulo mutiĝis pro kortuŝiĝo, fine li prenis la manojn de la kuracisto kaj diris emocie: “Mi amas Ĉinion.” En respondo la ĉina kuracisto diris tre emocie: “Mi amas Zanzibaron.”

Dum la pli ol du jaroj, la Ĉina Kuractrupo savis pli ol 230 gravajn malsanulojn. Iu maljuna zanzibara kuracisto diris kun profunda sento: “En la pasinteco, kiam la britaj kuracistoj estis ĉi tie, multaj pacientoj en la hospitalo mortis sen konata kaŭzo, sed vi savis tiel multe da homoj post via alveno. Kia feliĉo por la zanzibara popolo!” Elhospitaliĝinte post sia resaniĝo, multaj zanzibaraj popolanoj frekvente revenadis al la hospitalo por amika vizito al la ĉinaj kuracistoj kaj sin fotigi kun ili. Nemalmultaj kamparanoj alportis, kun sincera danko, kokinon, fruktojn aŭ ovojn de malproksimaj vilaĝoj en la urbon por ilin donaci al la ĉinaj kuracistoj. Ĉi tiuj akceptis la karan fratan senton de la afrikaj gefratoj, sed ĝentile rifuzis la donacojn dirante: “Prezidanto Maŭ instruis al ni, ke ni venu servi al la afrika popolo, kaj ni faris nur kion ni devas.”

### Aldoni Forton al la Konstruado de Zanzibaro

En januaro de 1966, la zanzibara hospitalo akceptis malsanulon nomatan Khamiŝi, kies paralizo jam disvolviĝis de la piedoj ĝis la brusto. Li paralizigis subite post alta febrado en junio, 1965. Misdiagnoze de kuracisto el iu orienteŭropa lando kiel spintumoro, la malsano pligraviĝis post trimonata kuracado, kaj fine li sin turnis al la ĉinaj kuracistoj por helpo. Post kuna ekzamenado plurfoja, la ĉinaj kuracistoj venis al la konkludo,

ke la paciento paralizigis pro akuta spinito, kaj decidis ĝin kuraci ĉefe per akupunkturo kun samtempa apliko de medikamentoj laŭ la okcidenta medicino kaj la ĉina tradicia medicino. Sed iu alilanda “aŭtoritato” en la hospitalo asertis, ke la paciento suferas de spintumoro, kaj insistis malfermi la spinon por rigardo. “Eĉ se ĝi estus spinito,” li diris, “ja neniu en la mondo trovis rimedon por ĝin kuraci, ĉu vi tamen povus ĝin kuraci?”

La ĉinaj kuracistoj sciis, ke estas malfacile kuraci tiel gravan paralizon. Sed ili decidis resanigi la kamparanan fraton afrikan. Ili firme kredis, ke ili povas kuraci ankaŭ tiun malsanon, nekura-ceblan por alilandaj “aŭtoritatoj”, se nur ili agos laŭ la penso de Maŭ Zedong. Kiam la ĉina akupunkturisto unuafoje pikis la gambojn al Khamiŝi, ĉi tiu sentis nenion. Sed la kuracisto ne malesperigis. Post 60-taga aplikado de akupunktura terapio, la gamboj de Khamiŝi fine reakiris senton. Tamen ili ankoraŭ ne povis mem moviĝi. Tiam la alilanda “aŭtoritato” kaptis la ŝancon por dissemi dubemon kaj intencis elpeli la pacieron kaj tiel interrompi la kuracadon.

La ĉinaj kuracistoj ĉerpis senliman forton el la “tri malnovaj artikoloj” de Prezidanto Maŭ. Ili diris, ke resanigi unu zanzibaran popolon signifas aldoni porcion da forto al la konstruado de Zanzibaro. Ili decidis kuraci la malsanon de



*Ĉinaj kuracistoj kuras zanzibaran fraton per akupunkturo.*




Khamiŝi kun la spirito de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn. Por ke la gamboj reakiru kapablon de moviĝo, la ĉinaj akupunkturistoj faris ankaŭ masaĝon dum daŭra apliko de akupunkturo. Estis varmege sur la insulo, kaj ĉiufoje ili ŝvitegis dum la masaĝo, tamen ili neniam interrompis sian kuracadon. Dum pli ol duonjaro, ili faris pli ol 230 fojojn da masaĝo kaj akupunktura kuraco kaj pli ol centfoje helpis la pacienton sin ekzerci en irado dank' al ilia subteno. Finfine Khamiŝi reakiris la kapablon de irado eĉ sur ŝtupetaro kaj povis labori denove.

Zanzibaraj amasoj nomis la sukcesan kuracon de la paralizo de Khamiŝi miraklo kreita de la ĉinaj kuracistoj. Iu maljuna laboristo en mal-sanula ĉambro diris: "Mi laboradis pli ol 20 jarojn en la hospitalo kaj vidis multajn fremdlandajn kuracistojn, sed mi neniam vidis tiajn, kiajn Prezidanto Maŭ sendis al ni, kiuj tiel arde amas nin afrikanojn." Kiam Khamiŝi forlasis la hospitalon, li diris kun larmoj firme premante la manon de ĉina kuracisto: "Mi estas malriĉa kamparano. Se ne estus la ĉinaj kuracistoj alsenditaj de Prezidanto Maŭ, mi ne povus havi la hodiaŭon. Mi deziras ke Prezidanto Maŭ vivu longe."

#### Malamputi Detranĉitan Manon por Klasfrato

Iutage en la mezo de majo, 1966, oni portis sur la operacian stablon de la hospitalo duonsvenan afrikan laboriston, kies maldekstra mano estis ĵus detranĉita de maŝino. Vidinte la gravan vundon, la deĵoranta zanzibara ĉeflegistino de la ĥirurgia sekcio tuj pretigis operaciajn instrumentojn por amputo. La laboristoj, kiuj alsendis la vunditon al la hospitalo, sentis bedaŭregon por la kolego, ke li perdos unu el siaj laboraj manoj kaj fariĝos kripla dum la tuta vivo.

Dum ekzamenado, la ĉinaj ĥirurgoj trovis, ke la maldekstra mano de la maljuna laboristo Ŝaaban Khamisi estas preskaŭ tute detranĉita, kaj en la restanta malgranda parto de haŭto kaj karno kunliganta la manon kaj la brakon troviĝas nur unu sangtubo kaj unu nervolinio. Por tia serioza kazo de maŝina vundo postulanta komplikitan kunkudran operacion, kaj kazo danĝera pro facile-infektebleco pro la granda surfaco de vundo, la ĥirurgia rimedo ĝenerale aplikata estas amputo. Sed tiam tio, kion pensas la ĉinaj kuracistoj estis la instruo de Prezidanto Maŭ, ke ĉion oni devas konsideri konforme al la interesoj de la popolo. Ili tuj firme decidis, ke amputon oni ne povas fari sed devas fari ĉion eblan por konservi la laboran manon por la afrika frato. Tiam ankaŭ la aliaj kuracistoj kaj flegistinoj de la kuractrupo alrapidis por helpi.



*Dank' al la fervora kuracado kaj atenta flegado de la ĉinaj kuracistoj Khamiŝi jam povas sinekzerci en piedirado helpate.*

Inspirate de la sperto pri sukcesa malamputo de fortranĉita mano en Ĉinio, la ĉinaj kuracistoj tuj komencis kunkudran operacion.

Kiam la estro de la Ĉina Kuractrupo diris al la maltrankvilaj laboristoj atendantaj ekster la operaciejo, ke la ĉinaj kuracistoj faros ĉion eblan por konservi la manon de ilia kolego, ili reĝojiĝis kaj emocie diris firme premante la manon de la trupestro: "Dankojn al vi, ni tute fidas al la ĉinaj kuracistoj."

Sed iu ĉeestanta kuracisto el orienteŭropa lando trovis la decidon nekomprenebla. Li diris al ĉinaj kuracistoj: "Kio la paciento estas por vi, ke vi faras tian penon por li?" "Li estas laboristo de Zanzibaro," trafe respondis la ĉinaj kuracistoj, "kaj nia klasfrato."

Dum pli ol duonjaro, ĉinaj kuracistoj sukcese faris kvin operaciojn por Ŝaaban, inkluzive de kunkudro kaj transplantado de haŭto kaj ostoj. (Vidu koncernajn fotojn sur la antaŭlasta paĝo de la kovrilo de n-ro 3.) Nun la vundita mano de la laboristo jam tute rekunkreskiĝis kaj li elhospitaliĝis.

Dum la du jaroj, la ĉinaj kuracistoj faris pli ol 5,000 grandajn kaj malgrandajn operaciojn, inkluzive de pli ol 20 komplikaj operacioj maloftaj en Zanzibaro al kranio, nervo, brusta vundo k. s. Kun aparta admiro oni nomas la sukceson de la mal-amputo farita de la ĉinaj kuracistoj al la detranĉita mano por la zanzibara laboristo “sukceso neimagebla”. La novaĵo rapide disvastiĝis tra la tuta urbo. La tuta zanzibara popolo laŭdas la ĉinajn kuracistojn pro iliaj elstaraj sukcesoj atingitaj en servado al la afrika popolo. Iu ĥirurgia flegistino diris: “Mi laboris 18 jarojn en la operaciejo, sed neniam vidis tian operacion. Dum la regado de la koloniistoj, oni havis nenium alian rimedon ol la amputajn tranĉilojn por mano- aŭ piedo-vundoj eĉ malpli gravaj.”

### Dankon al la Granda Gvidanto Prezidanto Maŭ

La zanzibara popolo dankas la ĉinajn kuracistojn, sed ili dankas pli multe Prezidanton Maŭ, kiu edukis kaj alsendis tiajn kuracistojn. Mohamed, paciento en la hospitalo, pendigis portreton

de Prezidanto Maŭ sur la muro apud sia lito. Li diris al la aliaj pacientoj en la ĉambro: “Prezidanto Maŭ estas la granda gvidanto de la ĉina popolo. La ĉinaj kuracistoj estas tiel bonaj, ĉar ili estas eledukitaj de Prezidanto Maŭ. Ni devas danki la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ!”

Iu zanzibara virino, foje kuracita de ĉina kuracisto, skribis al la ĉinaj kuracistoj: “Dum mi estis paciento en la hospitalo, mi legis kune kun la ĉinaj kuracistoj la artikolon de Prezidanto Maŭ *Rememore al Norman Bethune*. Vi estas tiel varmkoraj al la afrika popolo, vi vere meritas la nomon de ĉinaj Bethune, eledukitaj de Prezidanto Maŭ.”

A. A. Karume, la unua vicprezidanto de Tanzanio plurfoje laŭdis la ĉinajn specialistojn kaj kuracistojn alsenditajn de Prezidanto Maŭ al Zanzibaro. Citante la svahilian proverbon “Bona frukto devenas de bona arbo”, li diris, ke la ĉinaj specialistoj havas bonegajn kvalitojn, ĉar ili estas instruitaj de Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la ĉina popolo.

*La ĉina medicina grupo venis al zanzibara vilaĝo por kuraci tieajn virinojn kaj infanojn.*



# La Revoluciaj Popoloj de Diversaj Landoj Huraas pro la Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio

**E**N la jaro 1949, Prezidanto Maŭ montris: “Nia revolucio jam ricevis la simpation kaj huraon de la vasta popolo de la tuta mondo, kaj niaj amikoj sin trovas ĉie tra la tuta mondo.”

La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, la plej eminenta kaj plej granda proleta revoluciisto en la nuna tempo, estas envolvanta la tutan Ĉinion kaj skuanta la tutan mondon kun potencego de lavango kaj fortego de fulmaj tondroj. Kiel printempa pluvo vekas la teron, ĝi vekas ĉiam pli multe da revoluciaj popolanoj tra la mondo leviĝi en ribelo kontraŭ la malnova mondo kaj ĝin frakasi kun firma decido!

## Revolucia Movado Plej Granda, Plej Profunda kaj Plej Radikala

La progresemaĵoj de la kvin kontinentoj senescepte bonvenigas entuziasme la grandan revolucion, firme ĝin subtenas kaj varme ĝin laŭdas. Sennombraj revoluciuloj en ĉiuj anguloj de la mondo ĝojkrias unuvoĉe: “Prava!” “Bona!” “Bonega!” estas tiu ĉi “miraklo en la homa historio”, tiu ĉi “vera revolucio tre tre prava kaj ĝustatempa”.

Sekve de la disvolviĝo de la “plej granda, profunda kaj radikala revolucia movado”, kiel la revoluciaj popoloj de diversaj landoj ĝin glorigas, la proleta spirito de sentimeco en pensado, agado, sturmado, konduko de revolucio kaj ribelo disradias per miloj kaj miloj da oraj radioj kiel leviĝanta

suno kaj “lumigas la brilan kaj venkan vojon de batalo, laŭ kiu la popoloj de la tuta mondo marŝas al la socialismo de la epoko de Maŭ Zedong”.

Jen altaj laŭdoj de la revoluciaj popoloj de la mondo:

La senprecedenca granda revolucia movado okazis en la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento kaj en la granda socialisma Ĉinio kun kvarono de la tuta homaro, oriente de la mondo. Tiu movado “kreis novan etapon de la socialisma revolucio” kaj “komencis novan eraon de la internacia komunisma movado”; ĝi “ĉiam staros kiel grava mejloŝtono de nia epoko kaj okulfrapa signo pri la disvolviĝo de la tutmonda proleta revolucio”.

Ĝi estas “granda iniciato en la marksism-leninisma historio” kaj “tre granda iniciato en la historio de la monda revolucio”; ĝi estas “historia evento kun grava decida signifo en la sinliberiga batalo de la monda proletaro dum la lastaj cent jaroj” kaj “tre grava historia evento en la internacia komunisma movado”.

Ĝi estas ne nur “komparebla kun la Pariza Komunumo, la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj la granda liberiga milito de la ĉina popolo”, sed ankaŭ “senprecedence granda afero dum la ekzisto de la tero kaj la daŭro de la homa historio”.

Ĝi estas “signifoplena operacio” en la monda revolucio kaj ludas rolon “decidan al la estonto de la monda revolucio”. Ĝi “formas grandan

movan movforton en la internacio” kaj klarionas marŝon de granda ribelo kontraŭ imperiismo, la moderna reviziismo kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj tra la tuta mondo.

### La Revoluciaj Popoloj de la Mondo Vidas en Ĉinio Sian Esperon pri la Estonteco

Hodiaŭ, la plej grava afero prizorgata de la popoloj de la mondo estas la granda revolucio. Multaj revoluciuloj diris, ke ili “delonge atentis pri la firmaj paŝoj marŝantaj al tiu ĉi flanko faritaj de la ĉina popolo sub la gvido de sia granda Prezidanto Maŭ”. Ĉe sia Kvina Kongreso de la Partio de Laboro, kamarado Hysni Kapo, komitatano de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj sekretario de la sekretariejo de CK de APL diris: “La proletaro, revoluciuloj kaj ĉiuj progresemuloj liberamaj de la tuta mondo, kiuj estas esperplenaj pri la estonto, turnas siajn okulojn, penson kaj koron al Pekino.” Ĉiutage, ĉie en la mondo, multaj multaj homoj sidas ĉe radioriceviloj kaj atente aŭskultas ĉiun el la venkaj kaj ĝojgaj novaĵoj disaŭdigataj de la Pekina Radio pri la granda revolucio. Ĉiutage, sennombraj homoj staras antaŭ la montrofenestroj kun fotoj pri Ĉinio, aranĝitaj de ĝi en fremdaj landoj, kaj interesplene rigardadas ĉiun el la grandiozaj scenoj de la granda revolucio. Ĉiutage, multaj konkure eniras librejojn kaj bibliotekojn por aĉeti aŭ legi brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj literaturon eldonitan de Ĉinio pri la granda kultura revolucio, por akiri pli profundan komprenon pri ĝia granda instruo en teorio. Ĉiutage, multaj homoj deziras veni al Ĉinio “la decida batalejo de la monda revolucio”, por propraokule vidi la grandiozan amasan revolucion movadon, kaj “sentos sin feliĉegaj, eĉ se ili povos ĉeesti nur unu kunvenon”; kaj ili “volonte tion faros, eĉ se ili ricevos persekutadon de la reakcia aŭtoritato de sia lando”.

Frataj partioj kaj progresemaj amasaj organizoj de multaj landoj faris rezoluciojn, deklaciojn kaj deklarojn por saluti Prezidanton Maŭ, la grandan ĉefkomandanton de la granda revolucio kaj saluti la sturmantojn en la revolucio. Sennombraj gratulaj kaj salutaj leteroj alflugas, kiel nekalkuleblaj neĝeroj, el diversaj regionoj de la mondo, al Ĉinio kie iras la granda revolucio, al Prezidanto Maŭ, la granda instruanto de la monda revolucio kaj al la ruĝaj ribeluloj de Ĉinio. La revoluciuloj de ĉiuj landoj ege stimuliĝis pro la grandaj sukcesoj atingitaj de la ĉina popolo en la senprecedenca granda revolucio, kaj rigardas ilin kiel siajn proprajn sukcesojn. Ili diris: Tio ĉi estas ne nur venko de Ĉinio, sed ankaŭ venko

de la internacia proletaro kaj venko de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo. Ili huras mil kaj dekmil fojojn pro ĉiu el la venkoj de la granda kultura revolucio de Ĉinio.

### Huraado pro la Granda Venko de la Ĉinaj Revoluciaj Ribeluloj en la Potenc-deprena Batalo

Ili elkore ĝojkriis: “Ĝi estas granda revolucio firme altetenanta la standardon de proleta diktaturo.” La albana ĵurnalo *Popola Voĉo* skribis en sia redakcia artikolo: La klasbatalo en la sferoj de ideologio kaj kulturo de la socialismaj landoj estas, je la fina analizo, batalo por kapti, defendi kaj fortigi la proletan regpotencon. La esenca celo de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio kuŝas en tio, ke ĝi “celas blokadi por ĉiam en Ĉinio la vojon por estiĝo de reviziismo kaj restarigo de kapitalismo kaj malebligi ripeton de la tragedio okazinta en Sovetunio”. El la sperto de la granda revolucio de Ĉinio revoluciuloj de multaj landoj pli bone komprenis, ke la problemo de la ŝtata regpotenco estas la radikala problemo de revolucio, tial ili varme gratulas pro la grandaj venkoj akiritaj de la granda armeo de kultura revolucio, kun la ĉinaj proletaj revoluciaj ribeluloj kiel ĝia kerno, en sia batalo por depreni la potencojn de partio, administro, financo kaj kulturo el la manoj de la potenctenantoj kiuj iras la kapitalisman vojon.

Ili ĝojkrias emocie, ke tiu ĉi granda revolucio montras al ili “la neeviteblan vojon por ĝisfunda plenumo de la socialisma revolucio kaj transiro al komunismo”. La vastaj popolamasoj de Sovetunio kaj nombro da orienteŭropaj landoj, kiuj suriris la vojon de restarigo de kapitalismo post kiam la klikoj de la moderna reviziismo uzurpis la gvidantecon de la partio kaj ŝtato, ĉiam pli klare vidas la jenan veron: Post kiam la proletaro deprenis la regpotencon, oni nepre ne devas forgesi klasbatalon; oni nepre devas konduki revolucion ne nur sur la batalfrontoj de politiko kaj ekonomio, sed ankaŭ sur la batalfronto de ideologio, konduki revolucion por elimini la burĝan ideologion kaj starigi la proletan ideologion, elimini egoismon kaj starigi kolektivismon, alivorte, oni nepre devas konduki grandan proletan kulturen revolucion kiel Ĉinio, alie la tuta lando ŝanĝos sian koloron. En oktobro de 1966, kiam ĉinaj studentoj lernantaj en Sovetunio estis absurde ordonitaj de la sovetia registaro reveni al sia patrolando, iu sovetia laboristo diris kun prizorgemo al la ĉinaj studentoj: “Reveninte al via patrolando, nepre partoprenu la grandan kulturen revolucion, bone aktivadu kaj batu por la sovetia laboristaro la reviziistojn kiuj iras la vojon kapitalisman.” Multaj laboruloj

de Hungario montris, ke internaciaj spertoj pruvas, ke tre prudente agas Prezidanto Maŭ en sia persistado ĉe la proleta diktaturo kaj ĝisfina konduko de la socialisma revolucio, kaj tre necesa estas la granda kultura revolucio de li iniciatita, alie estas neeble akiri la finan venkon de la revolucio. En multaj universitatoj de Pollando preskaŭ ĉiutage iras debatoj, kaj amasoj de studentoj subtenas la grandan kulturen revolucion de Ĉinio. Iu pola fervoja oficisto diris kun firma tono al ĉina amiko: "Por estigi veran socialismon, oni nepre devas konduki grandan kulturen revolucion kiel vi!"

### Plipotenciĝos la Bazloko de la Monda Revolucio

Ili elkore huraas, ke la granda revolucio "faris Ĉinion lando nevenkebla" kaj "plej fortika citadelo de la monda revolucio". La revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj firme kredas, ke post la granda revolucio, Ĉinio, la centro kaj bazloko de la monda revolucio, nepre fariĝos ankoraŭ pli potenca kaj senŝanceliĝe kaj pli forte subtenos la revoluciajn movadojn de la popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la ceteraj partoj de la mondo. Multaj revoluciuloj montris, ke "Ĉinio jam fariĝis avangardo de ĉiuj revoluciuloj de la tuta mondo" kaj la revolucia popolo de Ĉinio estas "nevenkebla, plej plej granda forto por enterigi imperiismon". Parolante pri la granda venko akirita en la granda revolucio, iu vjetnama kamarado diris: Ĝi "estas ĉiufanka subteno al Vjetnamio batalanta sur la

kontraŭsona fronto. Ĉinio estas la plej fidinda postfronto de Vjetnamio". Edward F. Hill, prezidanto de la Komunista Partio de Aŭstralio (marksist-leninistoj) diris: La granda revolucio de Ĉinio "garantias la venkon de la tutmonda proleta revolucio". Grupo da elmigrintaj grekaj revoluciuloj montris en sia letero al Prezidanto Maŭ, ke la granda revolucio "estas garantio por brila sukceso de la tutmonda proleta revolucio kaj ĝia venko".

### Ĉiuj Diabloj kaj Demonoj de la Mondo Alfrontas Sian Pereon

Ili fiere ĝojkrias, ke la granda revolucio "batis, kun nekompareble granda forto, ĉiujn grandajn kaj malgrandajn diablojn kaj demonojn de la mondo". Revoluciuloj de multaj landoj montris, ke la venko de la granda proleta kultura revolucio "elradikos reviziismon" en Ĉinio kaj "frakasos ĉiujn revojn de la malamiko pri sia restariĝo". Iu japana amiko diris: "Tiu ĉi estas batalejo por decidi ĉu imperiismo aŭ socialismo venkos." Iu latinamerika amiko diris signifoplene: "Se ne estus Ĉinio, se ne estus tiu ĉi kultura revolucio, la homaro eble vizaĝus al malluma nokto de kontraŭrevolucia regado dum jarcentoj." La organo de la Komunista Partio de Brazilo skribis, ke tiu ĉi granda revolucio "eliminuos, el la laborista movado, la oportunisman venenon influantan preskaŭ ĉiujn laboristajn trupojn, kaj gvidos la laborantajn popolojn surpaŝi novan luman vojon".

*K-do E. F. Hill, prezidanto de la Komunista Partio de Aŭstralio (marksist-leninistoj), kaj lia edzino vizitas la Ekspozicion pri la Kultura Revolucio de la Nova Pekina Universitato.*



## Veki la Revoluciajn Popolojn de la Mondo ke Ili Leviĝu por Ribelo


Ili ĝojkrias en incitiĝo, ke la granda revolucio “kuraĝigas la ribelan spiriton de la proletaro tra la tuta mondo”. Diverslandaj revoluciaj popoloj laŭdas, ke tiu ĉi granda revolucio “brile repruvas, ke la ĉina popolo havas firman, obstinan kaj radikalan revolucionan spiriton”. La franca ĵurnalo *Nova Humaneco* skribis en unu el siaj artikoloj: “Per unu frazo Maŭ Zedong resumis la sentiman revolucionan ribelemon de la proletaro, t. e. **Ribelo pravas.** Tiu ĉi spirito kuraĝigas la ĉinan popolon leviĝi por kritiki la malnovan mondon, kaj tiu ĉi spirito estas lerninda ankaŭ por ni, francaj marksist-leninistoj.” Japanaj junuloj diris: “La vortoj de Prezidanto Maŭ donis al ni senliman revolucionan kuraĝon. Ni ribelos kontraŭ la sovetia moderna reviziismo, la usona imperiismo kaj la japanaj reakciuloj.” Revoluĉuloj de multaj landoj montris, ke ĝuste la ekzemplo kaj modelo starigitaj de la granda revolucio “sentigas al la marksist-leninistoj kaj ĉiuj veraj revoluĉuloj kaj komunistoj de la tuta mondo admiron, ĝojon kaj dankemon. Ĝi forte ilin subtenas kaj firmigis ilian memfidon por batali ĝis la fina venko de la komunisma afero.” Iu pola amiko skribis en sia letero al ĉinaj kamaradoj: “Vi estigis en la tuta mondo esperon pri la venko de komunismo.” Iu porlibera batalanto de Zimbabve diris, ke la revolucia ribelemo “faras nin pli fortaj en la batalo por la liberigo de Zimbabve.”

La revoluciaj popoloj de la mondo esprimas, ke ili ĉiam batalos ŝultro-ĉe-ŝultre kun la ĉina popolo, faligos imperiismon, la modernan reviziismon kaj ĉiujn reakciulojn sur la teron kaj premos ilin sub siajn piedojn, por ke ili neniam releviĝu!

Ĉiam pli potence flamas la grandioza fajro de la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. Tia fajrego certe ekbrulos ĉie tra la mondo. Prave diris iu laosa amiko: “Finfine venos la tago, kiam la revoluciaj popoloj de la mondo suriros la vojon nun iratan de la ĉina popolo. Ĝi estos la tago, kiam la brilo de la penso de Maŭ Zedong lumigos ĉiujn angulojn de la tuta mondo.”

Prezidanto Maŭ montris: “La usona imperiismo kaj ĉiuj aliaj malutilaj insektoj al la homoj jam pretigis siajn tombofosantojn, kaj jam ne restas longa tempo ĝis la tago por ilia enterigo.”

La mondo ja apartenas al ĝia popolo, kaj ĝi certe estos mastrata de la popolo de la mondo.




**L**A alvoko de kamarado Lin Biaŭ puŝis al nova etapo la amasan movadon de la kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ en nia tuta lando. Aperis ankaŭ en la alta, neĝkovrita himalaja-montregiono aro kaj aro da aktivuloj en kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ. Nun ĉie disvastiĝas rakonto pri ilia sentima spirito kuraĝe pensi, kuraĝe agi, kuraĝe batali, kuraĝe venki kaj decideme ŝanĝi la fizionomion de alta montaro kaj profundaj valoj, tial oni nomas ilin novaj “mal-saĝaj avoj” sur Himalaja-montaro.

### Enkonduko de Akvo de ekster la Ĉielo

Nuboj kaj nebuloj ĉirkaŭprenas la montpintojn, kaj morda frosteco ankoraŭ regas la valon de Trolma-rivero de Himalaja-montaro. Tamen sur la kruta Rivo-monto de la supera Jadong ĉie estas homfluo, kaj horuk-kantado skuas la montdeklivojn. Jen kaj jen aŭdiĝis la impona kanto: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon, venku ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”. Ili estas kamparanoj de Rapongang-subdistrikto de Jadong-gubernio, kiuj faras monthakadon kaj kanaletfosadon sur alta kaj kruta Rivo-monto por enkonduki ĝian fontakvon en la vilaĝon kaj ŝanĝi la tragedian historion de tiu subdistrikto: “Guto da akvo estas tiel kara kiel oleo”.

La subdistrikto situas sur iu montsupro ĉe la mallarĝa Trolma-rivero de Himalajo, kie mankas akvofonto. Tutjare la trinkakvo bezonata de 400-500 personoj devas esti transportata supren de montpiedo. Ĉar la monto estas tre alta kaj la vojeto tre kruta, kelkaj maljunuloj eĉ mortis de laciĝo sur la zigzagaj vojetoj dum la akvoportado.



En la subdistrikto cirkulas la malnova popoldiro: "Rapongang lokas sur la montsupro, oni laboras en nuboj kaj dormas en nebuloj, kaj akvo estas pli kara ol oleo kaj greno."

Tamen, ĉi tie troviĝas alia montego nomata Rivo, kiu havas kelkajn fontojn. La klara kaj dolĉa fontakvo neuzate forfluis pro tio, ke la monto estas alta kaj la vojo longdistanca. Sub la pasintaj subpremado kaj ekspluatado de feŭdposedantoj, tieaj kamparanoj neniam kuraĝis pensi pri la mont-hakado kaj akvokondukado sur la krutaj rokoj.

Sub la inspirado de la penso de Maŭ Zedong, la maljunulo Tserin Norbu, kiu devenis de familio de malriĉa sklavo, elmetis tiun proponon en iu studkunsido pri la verko *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* en la komenco de novembro, 1966. Tiam iuj estis ne certaj pri tio. Tamen tiu maljunulo preskaŭ sesdekjara kaj arĝente blankhara havis neelĉerpeblan energion, pensante pri kolektivaj intereso kaj la revolucia afero. Lia batalvolo pli altas ol la monto Himalajo. Li diris: "La Malsaĝa Avo estis tiom grandaĝa, sed li kuraĝis translokigi du montegojn. Ĉu tiom multe da gejunuloj en nia vilaĝo estas kneditaj el tero?"

La propono de Tserin Norbu tuj ricevis plentfortan subtenon de ĉiuj tieaj malriĉaj kamparanoj. La famaj fortuloj Dondrub, Norbu, Njima k. a. konkure suriris la montaron por esplori vojon kaj fonton. Ankaŭ multaj sin anoncis por iri sur montaron kaj en arbaron haki arbojn kiel konstruajn materialojn. Preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj partoprenis la laboron mobilizite.

Depost tiam, ĉiutage centoj da kamparanoj luktis sur la alta monto. Spite al la frosta vento kaj neĝo, ili fosadis kanaletojn, hakadis montojn

kaj konstruis akvokondukilojn de la mateno ĝis la vespero. Batalante sur la montegoj ili daŭrigis persiste la penan studon de la verko *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*. Lernante la spiriton de la Malsaĝa Avo, per ŝnuroj ĉirkaŭ siaj talioj ili sin ligis al la krutegaj rokoj, kies malsupro estas ne atingebla per okuloj, kaj elhakis ŝtonegojn por konstrui pontojn. Tage la vestoj de multaj homoj estis tramalsekigitaj de ŝvito, dum nokte ili fariĝis malmolaj pro frosteco. La brakoj de multaj el ili ŝvelis pro hakskuigiĝo. Sed ĉion ĉi tion ili ignoris. Tempo forpasis. Ili persistis en hakado 28 sinsekvajn tagojn, dorsportis pli ol 800 ciprestrunkojn de sur la altegaj montoj, kiujn eĉ sovaĝkaproj malfacile surgrimpis en la pasinteco, kaj finfaris pli ol 1,000 metrojn da kanaletoj, kiuj serpentumas tra pli ol dek montetoj, kaj fine enkondukis la fontakvon de Rivo-monto en la vilaĝon de Rapongang-subdistrikto. Kiam ĉiuj vilaĝanoj vidis klaran kaj dolĉan torenton alfluantan, ĉiuj ne povis sin deteni de kanto kaj danco, huraante la grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong.

### Ebenigo de Gola-monto

En la frua printempo de 1966, sur la supro de Gola-monto alte staranta en Ganggu-subdistrikto de Jadong-gubernio, pli ol cent gejunuloj kun nudaj brakoj ebenigis la monton kaj transformis ĝin en kampon per plantklingaj pioĉoj, spite de ventego kaj neĝo. Ili estas kamparanoj de la subdistrikto, kiuj havigis al si forton neniam elĉerpeblan post la studado de la verko de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*. Ili faris ĵuron, starigis al si grandan batalvolon kaj decidis ebenigi la pinton de Gola-monto, krei fekundajn kampojn kaj akiri abundon da grenoj.

Ganggu-subdistrikto sin trovas en la sudo de Rivo-subdistrikto kaj tutjare estas ĉirkaŭata de densa nebulo, kvazaŭ ĝi sidas inter blankaj nuboj. De generacio al generacio, ĉitieaj laborantaj popoloj nur povis kulturi malgrandajn pecojn da teraskampoj sur krutaj deklivoj de la montegoj kaj plantis sekalojn, pizojn k. a.. Post la Liberiĝo, pro manko de kulturebla tero, la greno bezonata de nemalmultaj kamparano-familioj estis entute provizita de la ŝtato. Tamen post la studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ en la pasinta jaro, sin armante per la penso de Maŭ Zedong, ili ekagis por revolucii. Ĉiam kaj ĉie disvolvante la principon de penega luktado kaj sinapogo sur la propraj fortoj, ili elmetis la sloganon postuli grenojn de montegoj kaj ne etendi manojn al la ŝtato. En marto de 1966, sub la gvido de la subguberniestro Tandzin kaj famaj produktaj modeloj Tandzin Buthrid, Jangdzom k. a., pli ol cent kamparanoj tenis la ruĝan flagon kaj surgrimpis la pinton de Gola-monto, kunportante pakaĵojn, manĝaĵojn kaj pioĉojn. Krome ili kunportis verkojn de Prezidanto Maŭ *Servu al la popolo, Rememore al Norman Bethune kaj Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo*. Tie ili starigis tendojn kaj komencis lukton por ekspluati la virgan teron sur Gola-monto.

En la antaŭvespero, kiam ili faris preparon por lukti kontraŭ Gola-monto, iuj personoj estis

“maltrankvilaj” por ili, dirante: “Neĝvento sur Gola-montpinto estas fortega. Krom la ĉiokapla Dio, neniu povas sukcese planti grenojn sur la monto.” Tamen ili fiere respondis: “Posedante la penson de Maŭ Zedong, ni ĉiuj estas dioj kun nekompareblaj fortoj.”

Estis tute hazarde, ke tuj post kiam ili suriris la monton, ilin trafis malbonega vetero. Neĝegis tri sinsekvajn tagojn, la ĉirkaŭaĵo fariĝis mondo de neĝo, la ĝisoste frosta vento kvazaŭ tranĉilo mordis la vangojn, kaj la tero frostiĝis kiel solida glaciaĵo. Sed ili daŭrigis persiste la lukton, neniu el ili volis malsupreniri de la monto. Nokte, muĝis ventego, sed ili ekbruligis grandan bivakfajregon kaj studadis la “tri malnovajn artikolojn”. Per obstina kaj firma decidemo ili ĉiutage persistis je la luktado de ekspluatado. Ju pli malfacila estis la kondiĉo, des pli diligente ili studis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj arde amis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Ili diris: “Havante la penson de Maŭ Zedong, ni kuraĝas surgrimpi glavmonton kaj iri en fajrmaron, kaj nenian malfacilon ni timas.”

Tagon post tago ili forhakis dornarbetojn sur la monto, forigis ŝtonegojn, prilaboris sume 6.67 hektarojn da virga tero kaj semis sur la nigra riĉdona tero de Gola-monto la unuan manplenon da fe-liĉigaj semoj.

*La geterkulturistoj de Tagtze-gubernio, Tibeto, sin okupas pri akvoutiliga konstruado antaŭ plugado por krei kondiĉon por pli abunda rikolto en la kuranta jaro.*







*Sinapogante sur la propra forto, la terkulturistoj de Tibeto rapide disvolvis la agrikulturan produkton post malfacila luktado. La foto montras la geagrikulturistojn, kiuj intensigas la prizorgadon de la sekaloj dum ilia posta kreskperiodo.*

### Konkerado de "Diabla Marĉejo"

En la supera Jadong de Trolma-rivervalo troviĝas ebena kaj vasta herbejo kaj marĉejo, kiun la lokanoj nomas "diabla marĉejo". Tie la vento estas fortega, kaj la klimato kaprica. En la pasinteco ĝi estis rigardata kiel malpermesita loko dum la malluma regado de feŭdisma servutula sistemo en Tibeto. La laborantaj popolanoj estis malpermesitaj ekspluati ĝin. La servutul-mastroj eĉ timigis dirante: "Ofendo de 'dio' povos malfeliĉigi la tutan valon de Trolma-rivero, kaj la malriĉaj familioj daŭre ricevos vipadon de mastroj."

Post la Liberiĝo, precipe post la studado de la verkoj de Prezidanto Maŭ, tieaj popolanoj armis sin per la penso de Maŭ Zedong, kaj timas nek la ĉielon, nek la teron, nek dion, nek diablon. Ili decidis frakasi malnovan kaj starigi novan kaj konkeri "diablan marĉejon". En la tempo, kiam glacio kaj neĝo sur Himalaja-montaro ekdegelis kaj la tero ekmalfrostiĝis, gejunuloj de la valo de Trolma-rivero starigis tendojn ĉe la kapo de "diabla marĉejo". La ruĝa flago flirtis sur la monteto. Ili forbruligis sovaĝajn herbojn de la marĉejo, frakasis per pioĉoj la "neston" de diabloj kaj elfosis fekundan marĉkoton per la ŝoveliloj. Iuj ensaltis en kotakvon profundan ĝis talio kun supren falditaj manikoj kaj pantalonotuboj por fosi drenan kanaleton, iuj plugis la teron per grandaj ŝoveliloj


kun nudaj brakoj. Ili tutkore deziris malkaŝi la "sekreton" de la "diabla marĉejo".

En la tagoj de la luktado kontraŭ la "diabla marĉejo", la herooj faris interkonkuradon, kaj ĉiu pene klopodis por fariĝi avangardano. Kvan-kam iliaj korpoj estis kovritaj de koto, tamen ili ĉiam estis ĝojplenaj. La horuk-kanto, ĝojkrio kaj kantvoĉo ŝvebis super Trolma-rivervalo de la mateno ĝis la vespero.

Nelonge post la tagnokta penega luktado de la gejunuloj, la "diabla marĉejo" estis konkerita, kaj ĉirkaŭ 153 hektaroj da fekundaj kampoj plugitaj. Rigardu norden de la marĉejo: Kanaletoj estas interplektitaj kaj la tero ebenas kiel spegulo. Nun ĉi tie oni povas rikolti unufoje dekmilojn da ĝinoj da grenoj. Kiam la laborantaj popolanoj de la valo de Trolma-rivero unuan fojon manĝis la bongustan *zamba*, faritan el sekalo rikoltita en la marĉejo, ili emocie nomis la "diablan marĉejon" "feliĉa marĉejo", kiun prilumas la penso de Maŭ Zedong. Ili fiere diris: "Kiel Prezidanto Maŭ diris, 'ni, la ĉina nacio, havas la spiriton fari sangan batalon kontraŭ la malamiko ĝis la fino, la firman decidemon por reakiri nian perditan teritorion sur la bazo de nia propra penado kaj la kapablon mem starigi inter la nacioj de la mondo.'"

# Daĝaj- anoj


La Daĝaj-brigado de Daĝaj-komunumo en Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco, estis malgranda montvilaĝo, kie troviĝis malmulte da kulturebla tero kaj ofte plagiĝis montflua inundo. Antaŭ la Liberigo, la tieaj loĝantoj kondukis ege mizeran vivon. Post la Liberigo, sub la gvido de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ la popolo en Daĝaj iris la vojon de kooperativigo kaj komunigo kaj, en la spirito de la Malsaĝa Avo kiu translokigis montojn, energie klopodis por plibonigi sian situacion sin apogante sur la propra forto. Ili rompis paŝo post paŝo la limigon de la naturaj kondiĉoj, plialtigis la produktokvanton de 70 kg. po muo (=  $\frac{1}{15}$  hektaro) ĝis 387 kg. en 1962 kaj fariĝis elstara ekzemplo de starigo de propra entrepreno per peniga lukto sur la tutlanda agrikultura fronto.



1. En la unua tagdeko de aŭgusto, 1963, daŭre furiozis fortegaj vento kaj pluvo en Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco. En Songhivivero levigis grandaj ondoj, kaj superakvego inundis. Sub la batado de la montakvego 80 procentoj de la domoj en Daĝaj estis faligitaj, pli ol duono de la kampoj kaj grenplantoj estis detruitaj, kaj tiel estigis serioza naturkatastrofo.




2. Armitaj per la penso de Maŭ Zedong la daĝaj-anoj luktis kontraŭ la fortegaj vento kaj pluvo kaj garantiis la sekurecon de la loĝantoj kaj dombestoj de la tuta vilaĝo. Ankaŭ iliaj rezervitaj grenoj ne estis difektitaj. Sed la detruigo de kampoj kaj la falo de domoj alportis al Daĝaj grandegan malfacilon. K-do Cen Jonggaj, sekretario de la partia filio, gvidis la loĝantojn rezisti la katastrofon kaj trovi elirejon.



3. La komunumanoj interligiĝis kun la Partio koro ĉe koro. La daĝaj-anoj unuanime esprimis, ke ili ne akceptos eĉ unu moneron da helpo de la ŝtato. Ili decidis venki ĉiujn malfacilojn sin apogante sur la propra forto.



4. La partia filio de Daĝaj alvokis al la komunumanoj, ke ili "unue rebonigu la kampojn sur la deklivoj kaj poste domojn, kaj antaŭ ĉio restarigu la faligitajn grenplantojn kaj malgrandigi la perdon. Ĉiuj daĝaj-anoj tuj agis, kaj en la daŭro de kelkaj tagoj ili restarigis la plantojn en pli ol 200 muoj da tero kaj ankaŭ drenis la kamparon.



5. Sub la gvido de la spirito de Malsaĝa Avo en la verko *Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo* de Prezidanto Maŭ, la daĝaj-anoj komencis ripari siajn kampojn, alportis ŝtonojn por starigi barilojn kaj rekonstrui siajn teraskampojn.




6. Alia grupo suriris la monton por haki ŝtonojn kaj arbojn, faris brikojn kaj konstruis novajn domojn kun ŝtona arktegmento aŭ tegoltegmento.




7. Dum la tuta jaro la daĝaj-anoj venkis diversajn naturkatastrofojn kaŭzitaĵojn de ventego, hajlado, frosto, sekegeco kaj inundo, kaj akiris riĉan rikolton kun grena produktkvanto de 372.5 kg. po muo.



8. Resumite la atingojn akiritajn en la riĉa rikolto, la partia filio de Daĝaj elmetis la demandon pri riparo de kampoj kaj la sonoran sloganon "Superu la pomuan produktokvanton de la regiono sude de Jangzi-rivero en 1964". La daĝaj-anoj energie luktis dum la tuta vintro, konstruis la unuan 15-muan "grandan ebenejon" kaj riparitis pli ol 100 muojn da tero ruinigita de la superakvego.



9. La daĝaj-anoj persistis ĉe la politiko de sinapago sur propra forto, kaj post unujara luktado la meza pomua grena produktokvanto de la tuta brigado atingis 404.8 kilogramojn kaj tiel efektivigis sian heroan sloganon "Superu la pomuan produktokvanton de la regiono sude de Jangzi-rivero".



10. La popolo de Daĝaj kun alta revolucia spirito estas marŝanta al nova venko sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong.

# *Duobla Venko de la Revolucio*

## *kaj Produkto en Ŝanhajo*

**A**LTE tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la proletaj revoluciuloj en Ŝanhajo tenas la revolucion, stimulas la produkton, kaj tiel prospere disvolvis la industria produkton. En januaro de la kuranta jaro, la totala produktvaloro de la metalurgia, mezurinstrumenta, ŝpinteksa, malpeza kaj multaj aliaj industrioj kreskis kompare kun tiu en la sama periodo de la pasinta jaro. Estas superplenumita ankaŭ la monata plano de ŝtalaj materialoj, mantraktoro, kotonaj ŝpinaĵo kaj ŝtofo, lako, papero, skribmaŝino, plastajoj kaj multaj aliaj bezonaĵoj en konstruado kaj ĉiutaga vivo.

Je la komenco de la kuranta jaro, plenmano da potenctenantoj en Ŝanhaja Urba Komitato de la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, ekblovis la nigran venton de ekonomiismo de kontraŭrevolucia reviziismo, instigis nombrojn da laboristoj forlasi sian produktan postenon, kaj tiel damaĝis en varia grado la produkton de iuj fabrikoj en Ŝanhajo. En tiu kriza momento, la proletaj revoluciuloj de Ŝanhajo amase leviĝis, efektivigis grandan unuiĝon, deprenis la potencon de la manoj de plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj ektenis en siaj manoj la potencon koncernantan al la Partio, registaro, financo kaj kulturo. Samtempe, firme efektivigante la principon de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion, stimuli la produkton”**, la proletaj revoluciuloj unuiĝis vastan revolucion amason kaj revolucion kadraron por persisti ĉe la produktposteno kaj penadi en

luktado, kaj tiel ne nur kovris la perdon kaŭzitan de la produktĉeso en la unua tagdeko, sed ankaŭ pliproduktis multe da urĝe bezonataj produktaĵoj por la ŝtato. La situacio de produkto estas bonega!


Post la transpreno de la potenco, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Ŝanhaja Plastaja Fabriko okazigis ĵurkunvenon por **“teni la revolucion, stimuli la produkton”**. La tuta oficistaro kaj laboristaro de la fabriko firme decidis forigi ĉiujn malfacilojn por strebi al venko. La fabriko superplenumis la produktan planon en januaro.

En la jarkomenco, kiam ekblovis la nigra vento de kontraŭrevolucia ekonomiismo ankaŭ en la Ŝanhaja Traktora Fabriko, kiu speciale produktas mantraktorojn de tipo “Laboristo-Kampano 7”, nombro da laboristoj estis trompita kaj forlasis sian produktan postenon, kaj tio influis la produkton de la fabriko. Por plenumi la produktan taskon, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de tiu ĉi fabriko sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Disvolvi nian batalstilon — kuraĝo en batalo, maltimo al sinofero, maltimo al laciĝo, kaj kontinua batalado (t. e. entrepreni senripoze sinsekvajn batalojn dum mallonga tempo)”**, kaj en pli ol unu semajno ili faris seninterrompajn sturmajn laborojn kaj fine antaŭtempe efektivigis la planon de januaro, fabrikinte 400 man-traktorojn.

La proletaj revoluciuloj de Ŝanhajo klare konscias, ke Ŝanhajo estas unu el la ĉefaj industriaj bazoj de nia lando kaj prenas sur si la honoran taskon de subteno al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruo de nia lando, kaj ke bone fari produkton estas grandega subteno al la revolucia afero de nia lando kaj la tuta mondo. La batalvolo por **“teni la revolucion, stimuli la produkton”** de la proletaj revoluciuloj de Ŝanhajo estas senegale arda kaj tio garantias duoblan venkon en la revolucio kaj produkto.



*La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la agrikultur-maŝina stacio en Ŝanhaj-gubernio ekzamenas kaj riparas la traktoron.*



*La laboristoj muntas la unuan nove konstruitan rapide instaleblan 3000-kilovatan turbinon.*

## **3000-kilovata Turbino Rapide Instalebla Fabrikiĝis en Ĉinio**

**E**N nur tri monatoj, la Turbina Fabriko de Kingdaŭ sukcesis fabriki la unuan 3000-kilovatan rapide instaleblan turbinon de Ĉinio.

Dum provfabrikado de la turbino, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la fabriko agis kun proleta revolucia spirito de sentimeco, kuraĝis pensi kaj iniciati kaj venkis la malfacilojn unu post alia. Sin postulante agi laŭ la altaj normoj de la persistemo de la Malsaĝa Avo en montotranslokigo, la scienca sinteno de Bethune en plibonigado de sia tekniko kaj la spirito de kamarado Ĝang Side servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve, ili disvolvis sian senliman revolucionan entuziasmon. Ili disrompis la rutinajn regulojn, kiuj katenis la produktan aktivecon de la laboristoj, kaj akiris brilan venkon en produkto. Ekzemple, por mallongigi la instalacion tempon por la aĉetantoj kaj faciligi la transportadon de la maŝino, ili faris detalan esploron kaj kuraĝe reduktis la altecon de la helpa maŝino de 3.7 metroj laŭ la origina projekto ĝis 3.41 metroj,

sen malpliigo de la kapacito. Dank' al tiu ŝanĝo, oni ne bezonas malmunti la maŝinon por enkestigo, nek uzi specialan veturilon por ĝin transporti. Sekve de tiu ŝanĝo, la originaj bluplanoj fariĝis neuzablaj. Laŭ la rutina procedo, oni devus unue ŝanĝi la projektajn desegnojn kaj poste fari la maŝinon laŭ ili. Sed la proletaj revoluciaj batalantoj rompintis la rutinajn regulojn, laboris kune kun la projektantoj kaj multe rapidigis la produktadon per mezurado kaj desegnado pri la ŝanĝitaj partoj dum la muntado. Dum la irado de la provfarado de la maŝino, ĉirkaŭ mil plibonigoj en projekto, teknologio kaj elekto de materialo estis efektiviigitaj en la laborejoj de la laboristoj kune kun la teknikistoj, kaj la rutina komplika procedaro estis tute ŝanĝita.


La sukcesa provfabrikado de la 3000-kilovata turbino rapide instalebla denove pruvas elokvente, ke oni povas stimuli la produkton nur per firma teno de la revolucio, kaj oni povas konduki la konstruadon multe, rapide, bone kaj ekonomie nur per ideologia revoluciigo.

# Ju pli “Eskaladis” la Milito, des pli “Eskaladis” la Nombro de Vunditoj kaj Mortigitoj

Por savi sin el malvenko en sia agresmilito kontraŭ Vjetnamio, la usona imperiismo, kvazaŭ vetemulo freneziga pro malgajno, faris ĉion eblan por sendi pliajn armeanojn al suda Vjetnamio kaj intensigi sian “eskaladon” en la milito, vane intencante trovi el tio elirejon. Sed, la kruelaj faktoj estas: ju pli multiĝis la usonaj agresantoj en suda Vjetnamio, des pli grandiĝis la nombro de iliaj vunditoj kaj mortigitoj.

Ĉiufoje kiam la usona imperiismo eskaladis novan ŝtupon en sia agresmilito kontraŭ Vjetnamio, ankaŭ ĝia malvenko kaj la nombro de ĝiaj vunditoj kaj mortigitoj leviĝis al nova ŝtupo. Tio jam formis rektan proporcion. La jena statistiko plej bone tion montras.

Jaro	Nombro de Usonaj Armeanoj Agresantaj Vjetnamion	Nombro de Vunditoj kaj Mortigitoj el Usona kaj Pupa Armeoj	Nombro de Vunditoj kaj Mortigitoj el Usona Armeo	Vunditoj kaj Mortigitoj el Usona Armeo Plimultiĝis ol en 1961
1961	1,364	49,329	8	
1962	9,865	85,358	256	31-oble
1963	16,500	133,296	993	123-oble
1964	23,000	208,263	2,140	266-oble
1965	167,500	227,500	19,200	2,399-oble
1966	ĉ. 400,000	370,000	108,000	13,499-oble
Sumo		1,073,746	130,597	





*Kazerno de la usona agresa armeo bombardita de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio troviĝas en fumo kaj malordo.*

# Heroaj Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio Forte Batas Usonajn Agresantojn

## **ESTAS EKSTERMITAJ PLI OL 500 PERSONOJ EL USONA MARINFANTERIO**

Frumatene de la 26-a januaro, iu bataliono el usona marinfanterio iris al Vilaĝo Xuyen Thanh, Gubernio Duy Xuyen por fari "forbalaadon". Nelonge post la ekmarŝo, ĝi jam falis survoje en la sieĝon de embusko de la liberigaj armitaj fortoj. Tri antaŭirantaj plotonoj de malamiko estis plejparte eliminitaj. Trovante sin en danĝera situacio, la malantaŭaj malamikoj haste sin retiris al fragmitejo apud rivero kaj obstine rezistis. La liberigaj armitaj fortoj tuj lanĉis furiozan atakon kaj pli

ol 500 usonaj agresaj armeanoj de tiu bataliono estis ekstermitaj sub potencaj bombardo kaj pafado.

## **RUINIGI 40 MUNICIEJOJN**

La liberigaj armitaj fortoj de Provinco Bien Hoa forte atakis la bazlokon por postfronta servo de usona armeo de Long Binh frumatene je la 4-a de februaro. En la batalo ili detruis 40 municiejojn kaj 22 militajn veturilojn en diversaj specoj kaj ekstermis 107 usonajn agresajn armeanojn.

## BOMBARDI USONAN KOMANDEJON EN VJETNAMIO

Antaŭtagmeze de la 13-a de februaro, la bravaj kaj sagacaj liberigaj armitaj fortoj de suda Vjetnamio bombardis per bombojetiloj la usonan komandejon en Sajgono. Obusoj eksplodis je malpli ol 70 metroj for de la komandejo kaj estis trafita unu el la kamionoj tie preterpasantaj de puparmeo de suda Vjetnamio. Dekoj da pupaj armeanoj estis mortigitaj aŭ vunditaj tuj ĉe la loko, kaj tio ĵetis la usonan kaj pupan trupojn en panikon.

## DRONIGI USONAJN MIN-BALAŜIPOJN

Du usonaj min-balaŝipoj renkontis embuskan atakon de la liberigaj armitaj fortoj je la antaŭtagmezo de la 15-a de februaro sur rivero 24 kilometrojn sudoriente de Sajgono. Unu estis grave difektita de furiozaj pafadoj el ambaŭ bordoj kaj tuj grundis kaj ankaŭ la alia estis difektita. Post tri horoj, en la sama rivero, plia usona min-balaŝipo dronis pro tuŝo al mino aranĝita de la liberigaj armitaj fortoj.

*La vjetnamaj batalantoj en Hanojo ekzamenas la usonan rabistan aeroplanon faligitan.*



*Usona agresa trupo, forte batita de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio, dronas en deprimateco kaj maltrankvilego.*





# Respondo al la Esperanto-Klubo de Toho-Altlernejo en Japanio

## Karaj geamikoj:

Koran dankon pro via letero, datita je 18-a de novembro 1966. Pardonu, ke ni ne respondas viajn demandojn punkton post punkto.

Antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio (1949), la imperiistoj kaj la reakcia kliko de Ĉiang Kajšek forte detruis la nacian kulturon de Ĉinio, malpermesis kaj subpremis la esperantistojn, kiuj propagandis patriotismajn ideojn kaj la veron pri nacisavado kontraŭ la japana imperiismo en la regionoj regataj de Kuomintango. Sed, la situacio en la liberigitaj regionoj estis tute alia. Ankoraŭ en 1939, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris en Jan-an: "Esperanto estas lerninda kaj lernenda, se oni ĝin uzas kiel formon por enteni la veran ideon internaciisman, la veran ideon revolucion."'

Post la Liberiĝo, en la nova Ĉinio Esperanto estas tute laŭleĝa, kaj la ĉinaj esperantistoj faris certajn laborojn en servo al la popoloj de la mondo sub la saĝa gvido kaj subteno de Prezidanto Maŭ kaj Komunista Partio de Ĉinio. El nia propra sperto ni profunde komprenas, ke Esperanto povas havi vivforton kaj vastajn perspektivojn nur kiam oni traktas ĝin laŭ la instruo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

El via letero ni scias, ke via klubo konsistas el junaj studentoj. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris: "Vi junuloj, plenaj de vivfreŝeco, estas en la tempo de florado, kvazaŭ la suno je la oka aŭ naŭa horo en mateno. La espero estas metita sur vin." Junuloj devas hardi sin en la ventegoj kaj pluvegoj de la monda revolucio kaj kontribui ion grandiozan favore al la popola revolucio. La historia rado ne retroturniĝos laŭ la volo de la imperiistoj,

nek laŭ la espero de la Ĥruŝĉov-revi-ziistoj. En la sesdekaj jaroj de 20-a jarcento, la homa socio iros nur al progreso, al revolucio, al socialismo kaj komunismo. Ni esperas, ke uzante Esperanton kiel batalilon, vi leviĝos kontraŭ la agreso de la usona imperiismo kaj faros vian kontribuon en lukto por la sendependiĝo de la japana nacio kaj la liberiĝo de la laboranta popolo. Japanio apartenas al ĝia juna generacio, patriota kaj kontraŭimperiisma, kaj al la japana popolo!

Ni sendas al vi aparte kelkajn esperantajn librojn kaj gazeton, eldonitajn en Ĉinio kaj esperas ke vi skribos al ni ofte por fortigi niajn interrilatojn.

Salutojn.

La Redakcio de EPC

## Karaj legantoj:

Ni ĝoje sciigas vin ke sub la gvido de la granda penso de Maŭ Zedong kaj la stimulo de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio kaj en aktiva respondo al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ pri teno de revolucio kaj stimulo de produkto, ni decidis aperigi nian gazeton ĉiumonate ekde la unua numero de 1967. Tio ebligas ke la raportoj de nia gazeto fariĝos pli riĉaj kaj pli aktualaj. Ni elkore atendas vian plenan subtenon.

El Popola Ĉinio



## Olelampo Uzita de Prezidanto Maŭ


Jen estas lampo uzita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ antaŭ pli ol 30 jaroj.

En la komenco de la jaro 1929, Prezidanto Maŭ iris, kun la ĉefforto de la Kvara Armeo de la Ĉina Laborist-kamparana Ruĝa Armeo sub sia gvido, for de Gínggang-montaro por krei novan revolucian bazlokon, kaj atingis en decembro la urbeton Gutian de Ŝanghang-gubernio, Fugian-provinco.

Tiam la Ruĝa Armeo estis fondita nelonge kaj nemalmultaj el ĝiaj kadroj kaj batalantoj devenis de malnova armeo. Por elimini la malbonajn influojn de la malnova armeo kaj starigi novtipan popolan armeon, la kompartia organizo en la Ruĝa Armeo kondukis en si senkompromisan batalon kontraŭ ĉiaj eraraj pensoj. Sub la lumo de tiu ĉi olelampo, nia granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ resumis la riĉajn spertojn en korektado de eraraj pensoj interne de la Partio en la Ruĝa Armeo, kaj verkis por la Naŭa Partia Kongreso de la Ruĝa Armeo la rezolucian tekston kun granda historia signifo "Pri Korektado de Eraraj Pensoj Interne de la Partio". Ĝi estas programo por la konstruado de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj ankaŭ programo por konstruado de la Komunista Partio de Ĉinio.

Tiu rezolucio vere metis la armeonstruan linion de la Ruĝa Armeo sur la bazon de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, rapide eliminis la influojn de la malnova armeo kaj faris la Ruĝan Armeon vere revoluciigita popola armeo. En la pasintaj pli ol 30 jaroj, la Ĉina Popola Liberiga Armeo, persone fondita de Prezidanto Maŭ, jam fariĝis eksterordinare revoluciigita kaj eksterordinare proletarigita revolucia armita forto, dank' al gvidado de la armeonstrua linio de la penso de Maŭ Zedong. Ĝi estas kolona bazoŝtono por la proleta diktaturo de nia lando, granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong kaj imitinda ekzemplo por la tuta popolo de Ĉinio. En la movado de la granda proleta kultura revolucio de nia lando, ĝi firme staras ĉe la flanko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj forte subtenas la proletajn revoluciulojn en batalakiro de la venko de la granda proleta kultura revolucio.

La principoj elmetitaj en la brila verko de Prezidanto Maŭ "Pri Korektado de Eraraj Pensoj Interne de la Partio" havas grandan signifon ankoraŭ hodiaŭ. Nun la granda proleta kultura revolucio en nia lando jam eniris la novan stadion de granda unuiĝo de la proletaj revoluciuloj por depreni potencon for de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Tiu ĉi brila verko de Prezidanto Maŭ havas grandan signifon en direktado al la revoluciaj amasaj organizoj en ilia batalo por venki diversajn pensfluojn de anarkismo.



# EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

**N-ro 5 (107) 1967**

## Ĉefa Enhavo

- Montotranslokigo Fare de la Malsaĝa Avo
- Prezidanto Maŭ Interviĝis kun Kamarado V. G. Wilcox
- La Tutmonda Popolo Prikantas Prezidanton Maŭ
- Novajoj pri Eldonoj de Verkoj de Prezidanto Maŭ en la Mondo
- Batalo por Depreni Potencon de la Provinco Ŝanhi
- Ŝtormo Ne Povas Faligi Fortan Pinon
- Deprenu la Potencon de "Egoismo" en la Kapo
- Heroaj Vortoj de la Revoluciaj Ribeluloj
- Ĉe la Loko Kie Leviĝas la Ruĝa Suno
- Heroo de Albanio — Adem Reka
- Heroa Maristo Hiong Jaŭĝang "Tri Malnovaj Artikoloj" en Gramofona Disko
- Dankon al Prezidanto Maŭ, ke Li Sendis al Ni Bonajn Kuracistojn
- La Revoluciaj Popoloj de Diversaj Landoj Huraas pro la Granda Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio
- Novaj "Malsaĝaj Avoj" sur Himalaja-Montaro
- Daĝaj-anoj (bildrakonto)
- Duobla Venko de la Revolucio kaj Produkto en Ŝanhajo
- 3000-kilovata Turbino Rapide Instalebla Fabrikiĝis en Ĉinio
- Heroaj Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio Forte Batas Usonajn Agresantojn
- Respondo al la Esperanto-Klubo de Toho-Altlernejo en Japanio
- Sur la kovrilo — Lernantino de mezlernejo (dekstre) laboras kune kun laboristino.
- Sur la dorskovrilo — Pejzaĝo de Ŝaŝiju



Stabile altproduktaj kampoj en la antaŭurbo de Ŝanhajo

